

HORIZONTO

I-a JARO N-o 3
MAJO - JUNIO 1976

KULTURA KAJ INFORMA REVUO

EL ETERNA PARIZO:
*Hôtel des Invalides,
el monstro de gloria
pasinteco*



SONDIĈOJ DE UNUECO

LA DUA MORTO DE PETER PENETER

BELETRO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón

Redakta Komitato
Fernando de Diego
Reinhard Haupenthal
Juan Régulo
Jean Thierry

Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)

Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo

Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8

Leĝa Depono Z-133-76
N.º 3 - Mayo-Junio - 1976

ENHAVO

KONDICIOJ DE UNUECO (Ivo Lapenna)
EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJOJ
Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj
(IEAJ)

PRINCIPA DEKLARO DE LA PREZIDANTO DE LA AKADEMIO
KELKAJ MEMORAĴOJ PRI LI... (G. Waringhien)

LA DUA MORTO DE PETER PENETER
(R. Haupenthal)

II.ª INTERNACIA ESPERANTO KONFERENCO

BELETRO

La Ĉarumo (trad. R. Bernard)
Vida Poemo (trad. R. Haupenthal)
La Pano (trad. R. Haupenthal)

OMAGE

LA ANTAŬJUGOJ (Jean Thierry)
DIALOGO KUN LA LEGANTOJ

Ĉu ni bezonas energion el atomreaktoroj? (H. J. Grimm)

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
Redaktas (Ivo Lapenna)

EN LA DANA ESPERANTO-MOVADO

Du proponoj kaj ties sekvoj (H. V. Ras-mussen kaj Christian Lauridsen)

EL NIAJ AGAD-GRUPOJ


Germanujo FR. (R. H.)

ENIGMO-LUDO (Jean Thierry)

REVUO DE LA REVUOJ

Redaktas (F. de Diego)

MALLONGE



PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono:
160,— S.

Britujo:
Geoffrey King, 12 Elmer Close, ENFIELD
Middx. EN2 7EZ. Pĉk. 37.507.9106. Jarabo-
no 5 £.

Danlando:
Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700
BRØNSHØJ. Bank-konto, 354-800468, Biku-
ben Jernbanalle 34, Zanolse. Jarabono:
60,— D Kr.

Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V.
Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:
Irmtraud Haupenthal, Franz-Schubert-Str.
26, D-6602 DUDWEILER. Pĉk. Saarbrücken
15293-667. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:
K. G. Eliopulos, 130 El. Venizelos Ave.,
NEA SMIRNI —Attiki—. Bank-konto Nro.
040-753362-40, Nacia Banko de Greklando
Eolu-str. Jarabono: 300,— Grekaj Drakmoj.

Hispanujo:
Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, ZARA-
GOZA-1. Pĉk. Zaragoza 00428398. Jarabo-
no: 500,— Ptoj.

Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, TETAH
TIKVA. Pĉk. Bank Hadoaz, 4458548.
Jarabono: 70 izr. liroj.

Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO,
Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.

Luksemburgo:
Albert Wickler, 17 rue St. Laurent, LO-
RENTZWEILER. Konto N.º 5603/6196-3,
CEE (Caisse d'Epargne de l'Etat). Jara-
bono: 380,— luksemburgaj frankoj.

Nederlando:
Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70,
NL-3002 ROTTERDAM. Jarabono: 25,— gld.

Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502
R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel
perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

KONDIĈOJ DE UNUECO

Konforme al la promeso farita en la lasta numero de *Horizonto* (p. 30), en tiu ĉi artikolo mi klopodos respondi al multnombraj leteroj turniĝantaj ĉirkaŭ la prema demando, ĉu la neŭtrala 'Esperanto-Movado, ideo plu unueca, havas ian ŝancon retrovi ankaŭ unuecan organizan formon. La solvo de tiu problemo estas urĝa, ĉar la nuna krizo estas multe pli profunda kaj pli vasta ol oni povus unuavide supozi. Ne plu temas nur pri UEA, kiu, eĉ pli rapide ol antaŭvidite en la Aprila Artikolo (*Esperanto*, 1974) ruliĝas en abismon, sed ankaŭ, multe pli grave, pri la estonteco de la Internacia Lingvo mem. Nepardoneble, nepre nepardoneble, tio okazas ĝuste en la periodo, kiam la situacio sur la lingva kampo komplikiĝas de monato al monato, kaj kiam politike senmakula, aktive neŭtrala, forta, digna kaj prestiĝa monda Esperanto-Organizaĵo, kia estis UEA ĝis Hamburgo (1974), devus kaj povus ludi decidan rolon en la traktado de la lingva problemo firme pledante por Esperanto.

Kaŭzoj de la krizo

Tri grupoj de faktoroj, reciproke kunligitaj, kaŭzis la nunan krizon: (i) kruda malobservado de la politika neŭtraleco; (ii) sistemaj nigrigadoj de mia nomo, absolute senprecedencaj en kiu ajn kultura movado, sed tre kutimaj en difinitaj tipoj de politikaj sistemoj; (iii) malkapablo de la nunaj respondeculoj en UEA gvidi la Asocion kaj utiligi ĝin por progresigi la lingvon surbaze de la ĝishamburgaj atingoj.

(i) La neŭtraleco kiel esenca kondiĉo de universaleco estas detale analizita en Cap. 18.2.1 de *Esperanto en Perspektivo* (p-oj 553-561). Ĉiuj sinceraj kaj seriozaj esperantistoj devus atente legi kaj relegi almenaŭ tiun parton de la verko por plene kompreni kial la politikigo de UEA ne povis ne disrompi la unuecon. Kompletige, necesas trastudi ankaŭ la verkon *Hamburgo en Retrospektivo* pri la kontraŭneŭtraleca konspiro, kiu kondukis al la hamburgaj malfeliĉaj eventoj. Pliaj kontraŭneŭtralecaj dokumentoj, kiuj atingis min post la Hamburga Kongreso, estas koncize prezentitaj en tiu ĉi numero de *Horizonto* en la rubriko ED. Tiu aspekto, do, estas abunde dokumentita kaj neniam hipokritaj "deklaroj pri neŭtraleco" povas kaŝi la bedaŭrindan realaĵon. Nek interne de la Esperanto-Movado, nek ankoraŭ malpli, ekster ĝi. Nur politikaj analfabetoj aŭ personoj, kiuj intence blindigas kaj surdigas sin, povas plu dormi trankvile. Cetere, ankaŭ malgrandaj infanoj kovras kapetojn per litotukoj kaj kusenoj kiam fulmotondras...

La klare unudirekta politikigo de UEA necese malproksimigis de la Asocio ne nur tre multajn membrojn kun aliaj politikaj konceptoj, sed ankaŭ tiujn personojn, inkluzive min mem, kiuj reagus absolute idente ankaŭ en kazo de politikigo en kiu ajn alia direkto, eĉ en tiu de la propraj politikaj konvinkoj, kontraŭe al la Statuto.

Tio kondukas al la jura kaj eĉ intelekta-morala signifo de la Statuto de UEA, pri kio necesas diri kelkajn vortojn. Kiel montrite en *Hamburgo en Retrospektivo* (*HeR*), kaj la estraro de TEJO kaj la politikaj konspirintoj en UEA devis senkompatate piedpremi la Statuton kaj la validajn laŭstatutajn Regularojn por atingi sian celon. Ili rilatis kaj plu rilatas al la Statuto kiel al senvalora paperĉifono (v. ankaŭ la artikolon de C. Lauridsen en tiu ĉi numero de *Horizonto*). Sed Statuto de kia ajn organizaĵo ne estas paperĉifono: ĝi estas baza jura dokumento kun karaktero de siaspeca kontrakto. *Malobservo de la Statuto estas, do, rompo de kontrakto*. Nenia plimulto, eĉ ne unanimeco, en kiu ajn gvida instanco povas ŝanĝi tion. Ĉiu ajn membro povus plendi al kompetenta kortumo por observigi la Statuton, kaj la kortumo, konstatinte la malobservon, tutcerte nuligus kontraŭstatutan decidon aŭ alimaniere devigus konformiĝi al la Statuto. Tio ne malofte okazas en landoj kun sendependaj kortumoj.

La verkintoj de la nun valida Statuto de UEA perfekte komprenis, ke la Asocio ne povas esti neŭtrala, se la aliĝintaj asocioj estas politike malneŭtralaj Tial art. 13 de la Statuto preskribas, ke *nur politike neŭtralaj* landaj organizaĵoj povas aliĝi al UEA kaj, kompreneble, resti en ĝi, se ili estas neŭtralaj. Ĝis la hamburga politika puĉo, kiun antaŭiris periodo de sekreta politika konspiro (1971-1974), tiu grava regulo *ja estis strikte observata* dank' al la firma sinteno de la tiamaj gvidaj instancoj de UEA, kiuj energie kontraŭstaris ĉian ajn provon atenci la politikan neŭtralecon de la Asocio (pri la reagoj de la tiama Estraro v. 4.4 de *HeR*). Nur post Hamburgo, kiam la konspirintoj kaj iliaj aliancanoj sukcesis ekregi la Asocion per kontraŭstatutaj manovroj, enkondukis totalecan cenzuron kaj forigis la ĉefajn protagonistojn de la laŭstatuta neŭtraleco, la pordo estis malfermita por senbrida politika agado de nombro da landaj asocioj en la sino de UEA mem laŭ la instrukcioj de ekstermovadaj politikaj faktoroj kaj eĉ konforme al aperte deklaritaj politikaj programoj. Pli evidenta malobservo de art. 13 de la Statuto ne estas imagebla.

(ii) La atakoj kontraŭ mi kun la celo komplete deformi mian tutan personecon kaj bagateligi mian ampleksan laboron por Esperanto estis kaj plu estas grandparte ligitaj al la demando de neŭtraleco. Eĉ se ne estus tiel, la nigrigoj de mia nomo per si mem ŝokis multajn kaj malproksimigis ilin de la nuna UEA. La afero ankoraŭ ne finiĝis: nun la Estraro de UEA obstine klopodas senigi min de miaj aŭtoraj rajtoj pri *Esperanto en Perspektivo* (ĝi donas al UEA konsiderindan profiton) kaj de mia modestega

tantiemo, kiun, post la fakta malapero de CED, mi volis uzi por aliaj utilaj celoj en la neŭtrala Esperanto-Movado. Pri tiu vere senprecedenca kampanjo mi ne volas diri ĉi tie unusolan plian vorton.

(iii) La malkapablo gvidi la Asocion estis antaŭvidebla jam en Hamburgo, sed ĝi povis plene manifestiĝi dum la preskaŭ 2-jara regado ekde julio 1974. Nur personoj, kiuj komplete ignoras la multflankajn ĝishamburgajn agadojn aŭ kiuj tro rapide forĝis la penan konstruadon de la moderna UEA en la postmilita periodo, povas kredi al la posthamburgaj promesoj, neniam realigataj, tordadoj de faktoj kaj blufoj, inkluzive la rolon de multnombraj "komisionoj", aŭ la signifon de la "libervolula servo", aŭ la "sanigon de financoj" (kiuj estis pli ol sanaj kaj tute ne bezonis sanigon) kaj similajn sloganojn por neinformitaj naŭvuloj. La realaĵo, tuŝebla nurparte kaj supraj, indikas precize la malon. Jen kelkaj nekontesteblaj faktoj.

La Tria Baza Laborprogramo, kiun mi mem kaj ĉiu serioza esperantisto rigardis ekde la komenco kiel grandan fuŝaĵon, sed kiun la Komitato spite akceptis dum la UK en Beograd (1973) sen mia ĉeesto, estas tute neglektita. Neniu, eĉ ne tiuj membroj de la komisiono, kiuj ellaboris ĝin, pensas pri ĝia realigo. En la Komitato, tute konforme al la "harmonia kunlaboro", neniu venis eĉ al la ideo demandi kial la Estraro faris nenion por realigi almenaŭ tiujn kelkajn taskojn, kiuj povis esti plenumitaj. Neniu proponis kiajn ajn plibonigojn aŭ ellaboron de nova, realeca programo. Regis kaj plu regas tomba silento. La saman sorton havas la *Laborplano por la Kontraŭrasisma Jardeko*, akceptita de la Komitato en Hamburgo. La realigado de tiu okaza Laborplano dum la restanta periodo de la Jardeko estus efike kontribuinta al batalo kontraŭ rasismoj kaj samtempe doninta grandajn pliajn avantaĝojn kaj al Esperanto kaj al UEA. Por la unua fojo ekde 1951, rilate bazan programon ekde 1955, UEA havas nek bazan programon, nek okazan planon de laboro. Alivorte, ĝi turniĝas surloke, sen kia ajn perspektivo kaj tial ankaŭ sen ebleco mobilizi la fortojn por plenumado de konkretaj taskoj kaj por atingado de difinitaj celoj.

La Statuto certe bezonis kelkajn plibonigojn. Mi mem atentigis jam antaŭ Hamburgo, ke taŭga okazo por fari la necesajn ŝanĝojn prezentiĝis antaŭ la 27-a de aprilo 1976, kiam, laŭ la nederlanda leĝo, neceso fari novan petskribon por renovigi la juran personecon. Efektive, post Hamburgo estis formita aparta 5-membra komisiono — kiom da ili jam?! — por revizii la Statuton. En pompa artikolo de nejuristo, komitatano U. J. Moritz, publikigita en *Esperanto* n-ro 3/75, estis prezentita la "antaŭprojekto" kun invito al la membraro fari komentojn. Post tio okazis nenio ĝis la julia-aŭgusta numero de *Esperanto*, kiu informis, ke dum la UK en Kopenhago oni diskutos pri la afero. Tamen, tie denove okazis nenio. Fine, oni povis legi en *Esperanto* n-ro 1/1976, ke finiĝis la ĝenerala voĉdonado kaj ke la membraro aprobis la pluvalidigon de la Statuto por plia periodo de 29 jaroj. Tio signifas, ke la malnova Statuto, sen kiaj ajn ŝanĝoj, estis submetita al voĉdono kaj ke nun UEA petskribos por daŭrigo de la jura personeco laŭ la neŝanĝita Statuto. Denove, do, granda bruoj por nenio. Valoraj tempo kaj mono superflue perditaj.

En la Jarlibro de UEA por 1975 oni povas legi, ke ekzistas 5-membra *Komisiono pri Informado* kaj ke la respondeca estrarano kaj gvidanto estas la sama S. Swistak (Pollando), kiu en Beograd estis allasita kiel komitatano A de la pola asocio tute kontraŭe al art. 30 de la Ĝenerala Regularo de UEA, ĉar antaŭ tio li ne estis MA de UEA dum minimume 3 jaroj. Cetere, laŭ art. 30 de la Statuto, la ĝenerala sekretario de la Asocio (nun s-ro E. L. M. Wensing) devas, interalie, prizorgi la mondan informadon. Plia komisiono funkciis dum la UK. Kaj la rezulto? Pliaj fojoj: skuigis montoj, naskiĝis eĉ ne muso. La tuta ĉapitro pri informado en la Estrara Raporto konsistas el unusola frazo: «Raporto de la kompetenta estrarano ne atingis nin». Oni ne forgesu, ke la statute respondeca estrarano estas la ĝenerala sekretario, do la sama kiu kunmetis la Estraran Raporton. Kaj pliaj fojoj, denove konforme al la "harmonia kunlaboro", neniu protestis pro tiu senrespondeca neglektado de la informado, unu el la ĉefaj agadbranĉoj, pro kiuj UEA ekzistas. Fakte, nenio estis por raportoj, ĉar ĉiuj antaŭaj agadoj sur la kampo de informado, kiuj rezultigis milojn da artikoloj en la monda gazetaro, prelegojn, informajn radio-elsendojn, ekspoziciojn, flugfoliojn, broŝurojn kaj tiel plu, estas ĉesigitaj. Krome, diversaj bultenoj kaj cirkuleroj, artikola servo, Unesko-Novajoj, statistikoj kaj analizoj sur la kampo de informado ne plu funkcias. Ankaŭ CED kiel scienca-esplora institucio de UEA fakte malaperis.

En la sfero de *eksteraj rilatoj* praktike ĉio stagnas. Ĉi tie oni formis plian komisionon de 6 membroj, dum alia komisiono ekzistas en Parizo. Sajnas, ke la plej epokfara atingado de tiuj komisionoj estas la letero-mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al la UK en Kopenhago. *Esperanto* akompanis tiun "eventon" per bombastaj vortoj, kvazaŭ tio estus ia eksterordinara sukceso, neniam antaŭe spertita en la kadro de la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko. Fakte, jam en 1953 la Ĝenerala Direktoro de Unesko sendis sian reprezentanton al la UK en Zagreb. Post la establiĝo de la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko en 1954, la Ĝenerala Direktoro de Unesko ĉiujare sendis mesaĝojn al la UK. Kelkfoje ili estis subskribitaj de la Ĝenerala Direktoro, kelkfoje de lia ĉefo de kabineto, kelkfoje de alia funkciulo de la Sekretariato. La mesaĝoj ĉiam estis aŭ legitaj aŭ menciitaj dum la inaŭguro. Doni al tia mesaĝo preskaŭ sensation valoron signifas humiliĝi la dignon de la Asocio.

Aparte bedaŭrinda estas la situacio en TEJO. Ekde kiam ĝi komencis politikumadi aperte malobservante sian Statuton kaj neglektante siajn verajn taskojn, TEJO ĉiam pli malintegrigadis kaj nun ekzistas ĉefe surpapere. Verŝajne ne troviĝas unusola serioza esperantisto, iom familiara kun la situacio en TEJO, kiu povus kredi al la bluoj pri la nombro de membroj kaj agadoj. Sufiĉas ĉi tie mencii, ke *Kontakto* n-ro 4/1974, kiu devis aperi fine de 1974, estis publikigita en januaro 1976.

Efektive, preskaŭ ĉiuj agadoj aŭ estas konscie ĉesigitaj aŭ tutsimple iel elvaporigis. Restas, esence, nur la organizado de la universalaj kongresoj, la rutina administrado de la membraro, la eldonado de la Jarlibro (nun en unu parto) kaj la publikigado de la revuo *Esperanto* kun grandegaj malfruigoj de pluraj semajnoj, eĉ de du monatoj ankaŭ tio, kiel multo alia, senprecedenca en la historio de UEA.

Ne estas surprize, ke, pro la koncize prezentitaj tri grupoj de faktoroj, UEA perdis en 1974 preskaŭ 800 individuajn membrojn kaj ke en 1975, laŭ la cirkulero de la prezidanto de januaro 1976, la membronombro denove malaltigis en 1975. Kvankam dum jaroj estis kutimo publikigi en *Esperanto* la statistikon por la antaŭa jaro, tio ankorau ne estas farita por 1975.

La nuna realaĵo retrojetas la Asocion al la fruaj kvindekaj jaroj, multlilate al la antaŭmilita periodo, dum la perdo de neŭtraleco ne havas paralelon en la tuta historio de la Esperanto-Movado. La grandega diferenco estas, ke en la fruaj kvindekaj jaroj komenciĝis la ascenda linio de konstruado, dum en la nuna kazo temas pri la ĝis nun atingita grado de malkonstruado sur la abrupta descenda linio. La procezo de malintegrigado estas nehaltigebla kaj kondukas al katastrofo eĉ por Esperanto, se la sinceraj esperantistoj de la mondo ne unuigas siajn fortojn por daŭrigi la vojon, kiun la hamburgaj disidentoj senrespondece forlasis.

Elirvojo

La kaŭzoj de la krizo determinas la elirvojon: strikta observado de la politika neŭtraleco, respekto al la homo kaj al lia laboro, daŭrigo kaj vastigo de ĉiuj agadoj en la tri ĉefaj branĉoj, nome informado-dokumentado, instruado kaj praktikaj aplikoj. Principe tio eblas aŭ en la kadro de UEA, aŭ ekster ĝi, aŭ kombinite.

En UEA mem la kerna demando estas tiu de politika neŭtraleco. Solvo de tiu demando aŭtomate kontribuas al solvado de ĉiuj aliaj multnombraj problemoj, kiujn frontas UEA sub la nuna gvidantaro. Reveni al la ĝishamburga politika neŭtraleco oni ne povas per malplenaj, sensecaj deklaroj, sed nur per konkretaj agoj konforme al la eksplicitaj preskriboj de la Statuto. Tio signifas, ke la landaj Esperanto-organizaĵoj kun partipolitikaj programoj devus deklari sin politike neŭtralaj kaj rezigni pri tiuj programoj ne nur formale, sed ankaŭ en siaj praktikaj agadoj. Pro la aktuala partipolitika linio de "akriĝinta ideologia lukto" kaj pro la nuna senkondiĉa subigo de la ĉefroluloj en tiuj organizaĵoj al partipolitikaj fortoj, tiu ebleco, kiu devus esti normala en UEA, estas fakte nur pura teorio. La dua ebleco estus, ke la Komitato eksigu la koncernajn landajn organizaĵojn laŭ la art. 20 de la Statuto kaj art. 27 de la Generala Regularo. Pro la konsisto de la nuna Komitato, grandparte politikiginta, ankaŭ tiu ebleco, klare antaŭvidita en la Statuto, estas provizore pura teorio. Tamen, membroj de aliĝintaj asocioj en demokratiaj landoj kaj individuaj membroj de UEA, ankoraŭ fidele al la principo de neŭtraleco, povus kaj devus tre laŭte aŭdigi sian voĉon en la landaj ĝeneralaj kunvenoj kaj energie postuli de siaj reprezentantoj en la Komitato de UEA sintenon konforman al la postulato de neŭtraleco. Plu silenti necese signifas konsenti. Se tiel, oni ne miru, ke la ekstera mondo denove rigardas kaj ĉiam pli rigardos la Esperanto-organizaĵojn kiel unudirekte partipolitike orientitaj. La tria ebleco estus, ke la politikaj landaj asocioj kaj instancoj libervole eksigu el UEA, formu apartan internacian Esperanto-organizaĵon bazitan sur la principoj de "proleta internaciismo", "dikrataro de la proletaro" kaj "klasa koncepto de la mondo", simile al la iama "Internacio de Proleta Esperantistaro" (IPE). Sen kompromiti sian neŭtralecon, la politike puriginta UEA povus fari kontrakton pri kunlaboro kun tia politika organizaĵo cele al progresigo de Esperanto, ĉar tion permesas art. 16 de la Statuto. Kvankam ankaŭ tiu ĉi ebleco ŝajnas nur teorio en la nuna momento, tamen ĝi estas racia kaj la malplej malrealeca solvo de la problemo. Eĉ la partipolitikaj gvidantoj de la blokaj landaj Esperanto-instancoj kaj iliaj aliancanoj pro politikaj aŭ nepolitikaj motivoj en la t.n. "okcidenta" parto de la mondo eble fine komprenos, ke la nuna UEA sub partipolitikaj premoj estas absolute malakceptebla por la grandega plimulto de esperantistoj en la mondo, inkluzive la blokajn landojn.

Kompreneble, la solvo de tiu problemo estas nedisigeble ligita al observado de la aliaj reguloj de la Statuto, nuligo de ĉiuj kontraŭaj decidoj ekde Hamburgo, retiro de ĉiuj kalumnioj kaj ofendoj kontraŭ min kaj aliajn sincerajn batalantojn por la politika neŭtraleco de UEA kun publika pardonpeto al la viktimoj, objektiva prezento de la vero en la organoj de UEA kaj ellaboro de nova, realeca Laborprogramo, kiu povus unuigi kaj mobilizi ĉiujn pozitivajn fortojn por plua progresigo de Esperanto.

Ekster la kadro de UEA la neŭtrala Esperanto-movado — ne nova, kiel maliculoj disfamigas, sed tre malnova: ekde 1887 — povas denove publike esprimiĝi pere de *Horizonto*, la laŭtparolilo de la vero, objektiva informado, kulturo kaj partipolitike neŭ-

trala Zamenhofa humaneca internaciismo. Nuntempe — ĝis la krizo en UEA solvigos, se entute ĝi iam ĝi estos solvita — ĉiuj pozitivaj fortoj kolektiĝu ĉirkaŭ *Horizonto*, abonu kaj abonigu la revuon, diskonigu ĝian enhavon. Krome, oni formadu kiel eble plej multajn agadgrupojn laŭ la saĝaj konsiloj de la Internacia Agadgrupo kaj de la Redakcio de *Horizonto* en n-ro 1 de la periodaĵo (p. 3). Fine la plej sindonaj aktivuloj klopodu partopreni la internaciajn konferencojn kaj diversajn kulturajn aranĝojn de la neŭtrala Esperanto-Movado.

Kombinite oni povas efike agi laŭ la supraj ideoj kaj en la sino de la ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj sur ĉiuj niveloj — loka, landa kaj faka — kaj ekster ili.

Multaj esprimis la deziron, eĉ preman deziron, ke estu organizita nova internacia asocio laŭ la principoj de partipolitika neŭtraleco kaj individua membreco, kies celo estus daŭrigi tie, kie la nuna UEA haltis. Aliaj, same sinceraj, opinias ke en la nuna momento la kontaktoj kaj kunlaborado pere de *Horizonto*, agadgrupoj, internaciaj konferencoj kaj renkontiĝoj prezentas sufiĉe vastan framon por realigadi la programon entenan en la *Deklaro de Principoj*. Tute egale kion decidos la Dua Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, unu afero estas certa: la idea unueco esprimita en la *Deklaro de Principoj* ebligas multflankan utilan laboron por Esperanto jam en la nuna stadio de tute elasta kaj neprecizigita organiza strukturo. Ju pli sukcesa estos tiu laboro, ju pli la neŭtrala Esperanto-Movado esprimos sin mem en la ekstera mondo disde la nuna politikiginta UEA, des pli granda estos ĝia prestiĝo kaj des pli facile estos doni al ĝi taŭgan, pli konkretan organizan formon kun Statuto, kiu malebligos politikajn konspirojn kaj puĉojn.

Unueco ja estas forto. Tamen, pure abstrakta-formala "unueco" sen ideo unueco, je la kostoj de politika neŭtraleco, ne estas forto, sed falsa slogano de malforto. Nur ideo unueco, sur kiu, se nepre necese, oni ĉiumomente povas konstrui partipolitike neŭtralan organizaĵon, donas plenan valoron al la slogano. Nur ĝi estas akceptebla por ĉiuj esperantistoj, kiuj sincere deziras kontribui al la progresigo de Esperanto en la mondo sen altrudado de siaj partipolitikaj konvinkoj al organizaĵoj, kiuj laŭ siaj statutoj devus esti partipolitike neŭtralaj. Tial ĉiuj personoj, kiuj aprobas tiel komprenatan unuecon, devus troviĝi en la vicoj de la neŭtrala Esperanto-Movado, unuigi siajn fortojn kaj maksimume kontribui al la plua disvastigo de Esperanto, kiu urĝe bezonas helpon, antaŭ ol estos tro malfrue. Tio precipe rilatas al vere progresema esperantista junularo, sincere inspirita de la nobla, tuthoma idealo de humaneca internaciismo.

Ivo Lapenna

EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAĴOJ

NOVAĴOJ DE IEAJ

Nova Estraro. — Per skriba voĉdonado, kiu finiĝis la 13-an de aprilo 1976, la membraro de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) elektis novan Estraron per ĉiuj voĉoj kun du sindetenoj. La Estraro nun konsistas el Prof. D-ro Ivo Lapenna (Britio), prezidanto; S-ro Erik Gadd (Finnlando) kaj Eksterordinara Profesoro D-ro S. C. Anagnostakis (Grekio), vicprezidantoj; D-ro Klaus Perko (Aŭstrio), kasisto-sekretario.

Redaktoro de IJR. — Per ĉiuj voĉoj kun unu sindeteno Prof. D-ro Ivo Lapenna, regula profesoro pri Kompara Orienteŭropa kaj Soveta Juro en la Universitato de Londono, antaŭe profesoro pri Publika Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Universitato de Zagreb, estas elektita kiel nova redaktoro de *Internacia Jura Revuo*.

Kunveno de IEAJ en Parizo. — La nova Estraro de IEAJ decidis, ke la sekvanta kunveno de la Asocio okazu en Parizo dum la Dua Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado. La ampleksa tagordo de la kunveno rilatas, interalie, al la organiza stato de IEAJ, Internacia Jura Revuo, ellaborado kaj publikigado de terminaroj por diversaj juraj branĉoj, disvastigo de Esperanto en juraj medioj kaj eldonado de internacijuraj tekstoj en Esperanto. La precizaj tago kaj tempo de la kunveno troviĝos en la definitiva programo de la Konferenco.

Informoj pri IEAJ. — Kun la afabla permeso de la redakcio de *Horizonto*, IEAJ regule publikigados koncizajn komunikojn de la Estraro por la membroj de IEAJ.

Aliĝo. — Juristoj kaj aliaj personoj, kiuj laŭ la Statuto povas fariĝi membroj de IEAJ, bv. sin anonci al sekretario-kasisto S-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845. La kotizo estas 120 aŭstria ŝilingoj aŭ egalvaloro. Ĝi inkluzivas la abondon al *Internacia Jura Revuo*.

PRINCIPA DEKLARO DE LA PREZIDANTO DE LA AKADEMIO

Sube ni publikigas esencan parton de deklaro, kiun faris la prezidanto de la Akademio en sia cirkulero n-ro 120 de la 9-a de aprilo, 1976, al la membroj de la Akademio:

De nia nova kol. R. Haupenthal mi ricevis, la 3-an de marto 1976, leteron, el kiu jena paragrafo:

«Por mi gravas la fakto, ke la prezidanto de la Akademio intencas ĉeesti kongreson de la nuna U.E.A. volante kredigi, ke tiun fakton la nunaj gvidantoj de U.E.A. ne ekspluatos kiel aprobon al sia politiko... Vi ja ŝuldas respondon al tiuj kolegoj, kiuj senkompromise distanciĝis de U.E.A.»

Al tio mi respondis, sed ĉar la demando prezentas ĝeneralan intereson, mi deziras informi ĉiujn kolegojn pri mia sinteno tiurilate.

- 1." Mian personan opinion pri nia kol. Lapenna mi neniam kaŝis: mi rigardas lin kiel la indan postvenanton de tiuj grandegaj esperantistoj, kiuj plej progresigis la movadon, Bourlet, Hodler kaj Privat; kaj, pli sukcese ol ili, li, dank' al siaj esceptaj kvalitoj de diplomato, organizanto kaj oratoro, altigis U.E.A. ĝis la rango de la rekonataj internaciaj organizoj. Tial mi profunde indignis kontraŭ la hontinda kampanjo de kalumnioj, per kiuj kelkaj oponentoj provis, sed vane, makuli lian honoron kaj subfosi lian prestiĝon.
- 2." Sed kiel Prezidanto de la Akademio mi povas havi nur unu solan gvidlinion: konservi al ĝi la karakteron de "sendependa lingva institucio", kiun difinas la artikolo 1-a de la Statuto. Tial mi ĉiam tenis la Akademion ekster la politikaj aŭ organizaĵaj polemikoj, kaj penadis rilati senpartie kaj al U.E.A. kaj al S.A.T. Kaj, same kiel mi — kun aliaj eminentaj kolegoj — partoprenis egale en la SAT-kongreso en Augsburg kaj en la UEA-kongreso de Vieno, mi intencis ĉi-jare viziti kaj la Universalan Kongreson en Ateno kaj la Internacian Konferencon de la Neŭtrala Esperantista Movado en Parizo — kion nebligas la fakto, ke la dua okazos samtempe kiel la unua.
- 3." La akademianoj ĉeestantaj Universalan Kongreson ordinare profitas la okazon, por kunveni neformale kaj diskuti pri demandoj rilataj al la funkciado de la Akademio kaj al la lingvo mem; konciza protokolo kutime aperas pri tio en la sekvanta Cirkulero. Se pluraj aliaj akademianoj kunvenus en alia loko kaj diskutus pri tiuj du specoj de demandoj, mi volonte diskonigus al aliaj kolegoj la rezulton de iliaj diskutoj.

Miaj kolegoj Neergaard kaj Bernard plene konsentas kun tiu deklaro; nia vicprezidanto Neerdaard aldonas, ke, konforme al tiu gvidlinio, li intencas partopreni la SAT-Kongreson en Gotenburgo.

La Prezidanto
G. WARINGHIEN

KUNVENO DE MEMBROJ DE LA AKADEMIO

Dum la Dua Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazonta en Parizo de 1-8 Aŭgusto 1976, okazos kunveno de tiuj membroj de la Akademio de Esperanto, kiuj partoprenos la Konferencon. La kunveno pritraktos demandojn rilatantajn al la funkciado de la Akademio kaj al la lingvo mem. La preciza tago kaj horo de la kunveno estos indikita en la definitiva programo de la Konferenco.

F. de Diego, R. Haupenthal, I. Lapenna.

KELKAJ MEMORAĴOJ PRI LI...

Gaston Warinzhien, Kolomano Kalocsay
kaj la «kipu»-seĝo en la
loĝejo de Kalocsay, Budapeŝto, 9 aŭg. 1959.



En la butikoj de la Pariza Centra Librejo, kiun tiam regadis, iom malnovmode sed ne senefike, la bedaŭrata Dauphin, mi ĉe unu mia trapaso malkovris forlasitan numeron de kurioza revuo. Estis ĉirkaŭ 1928, kaj temis pri "Literatura Mondo"; mi senzorge ĝin foliumis, kaj miaj okuloj falis sur versliberan poemon, kies tono tuj min entuziasmigis:

*Jes, mi, atomo
pasema kaj efemera kaj bagatela: homo!
Ne pli daŭra ol la trema rosguto sur via musko...
Ho, kun febra saluto mi laŭdu mian vivon momentan!
Rokoj! aŭdu! Kontraŭ via glacie eterna kuŝo
mi jetas el krianta buŝo la veron de mia ekzisto...*

Tio kontrastis tiele kun la sengustaj sentimentalaĵoj de la tiama Esperanta literaturo, ke mi tuj decidis skribi al la poeto mian admiron. Tiel komenciĝis mia amikeco kun Kolomano Kalocsay... kaj ankaŭ mia kunlaborado, ĉar li tuj instigis min redakti tiun skizon de la Esperanta metriko, por kiu mi sencele jam de jaroj kolektadis notojn, dum li mem ekversis sian "Arton Poetikan". Nur en 1932 mi havis la ĝojon premi al li la manon, en la Pariza Kongreso. Kun li kaj lia edzino mi grimpis sur la turojn de Notre Dame; ni vizitis en Versajlo la Trianonon, kaj li rigardis kun malespero tiun faman unupecan tablegon, sur kiu diplomatoj subskribis la dispartigon de lia patrio; mi veturigis ilin laŭlonge de Sejno, kaj li estis unu el la kvin ĉeestantoj, kiuj deĝnis aŭskulti mian prelegon pri la moderna franca literaturo. Sed ankaŭ ni laboris, ĉar li alportis la provaĵojn de la "Parnasa Gvidlibro", kiu altiris al ni tiom da kritikoj, sed kiu estas al mi des pli kara, ĉar ĝi estas nia unua komuna verko. Li estis tiam, kiel iom poste pentris lin Maura:

*Nia majstro, la bona Gargantua,
Kies geni' sin fleksas al plej infana ĝojo,
Frandema, voluptama, flarsperta, vinoĝua,
Kranio por eterne ŝirmata de ĉizoj,
Sed fate konsekrita al la kronanta laŭro,
Neelĉerpebla fonto de l' kanto sonorflua,
Kies muzik' eĥigos en la senfina daŭro,
Unika Kalocsay, ĉi Koloman' Unua!*

Kio eble plej frapis min, tio estis la miriga simileco de niaj gustoj pri tiom da diversaj kampoj; jam tiam, kaj plu en la sekvantaj jaroj, mi konstatis, ke ni egale ŝatas la fiksformajn poemojn kaj la farĉitajn paprikojn, senharajn virinkrurojn kaj poeziajn neclogismojn, la tokajojn kaj "La Maron" de Ch. Trénet... Estis kvazaŭ mi estus trovinta alian memon, pli talentan kaj pli grandan, sed intime fratan.

Poste en Vieno, je la Kongreso de 1936, ni denove ĝuis la plezurojn de amika kunvivado; mi memoras la mildecon, kun kiu li dividis kun paseroj sian matenmanĝon, lian admiron, en la parko de Schönbrunn, antaŭ la gracieco de la hejmiĝintaj sciuroj; kiel, en la Pratero, ni allasis nin al la emocioj de la "Ondanta Fervojo" (mi ne scias, kial la Francoj ĝin rusigas), kun, inter niaj genuoj, la dikaj presprovaĵoj por la dua eldono de la "Plena Gramatiko"...

Kaj alvenis kvar jaroj da tragika silentado. Sed nek la milito, nek la reĝimŝanĝo povis longe nin disigi. En 1959 mi fine trovis la vojon al Budapeŝto, ia vundita, apenaŭ resaniĝanta Budapeŝto; sur la preskaŭ dezerta kajo — malmultaj tiam transpasis la ferkurtenon — mi revidas lian altan silueton, kaj lian akceptan brakumon. Mi trovis en la sino de lia familio amoplenan gastigon, kaj mi tiam pasigis unu el la feliĉaj semajnoj de mia vivo; li montris al mi la pitoreskaĵojn de la duobla urbo, li kondukis min sur la tramon ludilan de la "Ruĝaj Falkoj", li enŝipigis min por vidi la Balatonon. Kaj unu vesperon, en la hejmo, li donis al mi por legi la soneton, kiun li verkis pri mi dum la mallumaj jaroj:

AL KAPTITA AMIKO

Amiko mia inter dratoj dornaj
de OFLAG, miaj pensoj al vi iras:
kian vi faras, kiel vi sopiras
je via dolĉa franca ter' el mornaj
barakoj, kaj el inter la homformaj
gardistoj, kiuj rasorgojlon spiras,
kaj kies sanga romantik' aspiras
je l' glor' de l' tempoj de la kaskoj kornaj.

Alia estis tiu romantiko
germana, kiun amis vi, amiko...
Ho, vin konservu firma la espero
je l' fea tago, kiam vi alhejme
eskaŝos el la romantika tero,
kiun malamamis-via Heine.

Pli ĝuste li estus skribinta "nia" Heine, ĉar jam de tiu tempo ni planis ampleksan tradukon de ties ĉefaj verkoj; sed la pretigo de la "Kantoj kaj Romancoj" postulis de ni ambaŭ preskaŭ tiom da pacienco kaj korespondado, kiel antaŭe la "Floroj de l' Malbono"; pri kio li aludis en tiu alkaja odo, kiu, pro troa amplekso de la unua parto, ne povis trovi lokon en la "Ora Duopo" apud lia letero al W. Auld:

Jes, kune, jes, sed el kia malproksim'
respondis argumento al argument'
en la diskutoj gramatikaj!
kaj delikata sopirĝemeto
el "douce France" a la Danuba bord'
kaj de ĉi tie poste returne al
Francujo flugis plurajn fojojn
ĝis la ricevo de pura formo...

Ni lastan fojon renkontiĝis en 1966, dum la Budapeŝta Kongreso — li jam sentis la efikon de la malsano, kaj, ĉe nia adiaŭa brakumo, li apenaŭ retenis larmojn. Neniam plu mi do revidos en liaj okuloj tiun fajreron, sur la lipoj tiun petolan rideton, kiujn mi tiel amis; neniam plu mi povos turni min al li por peto pri konsilo aŭ decido. Sed eble, post nia forpaso el ĉi tiu mondo, restos plu kelkaj atestaĵoj de nia longa, intima kunpenado. Kaj tio estas iela, ioma konsola.

G. Waringhien.

¹ Maura verŝajne pensis «for de tondilo»: ha, tiu rimkapricemo! Mi aldonu, ĉi-okaze, ke, en la pseŭdonimo Kopar, kiun uzis Kálmán Kalocsay, kaŝiĝas vortludo internacia: ĝi ja aludas la paron de k-oj en lia nomo, sed hungare ĝi signifas: kalva.

De Kolmano al Gaston
Varingian': ĝen mi, danksigne
Kaj kun amika sintfeston':
de Kolmano al Gaston.
Ĉar li per sia sorĉbaston'
beligis min (anseron aigre):
de Kolmano al Gaston
Varingian': ĝen mi danksigne.
Budapest 25/IX. 1933.

K. Kalocsay

La dua morto de Peter Peneter

Enkonduka rimarko

En 1972, okaze de la Hungara Kultur-Festivalo, mi vizitis la karmemoran Kálmán Kalocsay en ties budapeŝta hejmo kaj faris kun li longan intervjuon. La plimulto de tiu intervjuo jam aperis en *Norda Prismo*¹. La interparolo, kompreneble, sin turnis ankaŭ al la persono de tiu ormistera Peter Peneter. Tiam, laŭ la deziro de Kalocsay, mi ellasis tiun parton. Nun, post lia bedaŭrinda forpaso, nenio jam malhelpas publikigi ankaŭ la reston de la intervjuo. Jen ĝi:

Reinhard Haupenthal: Oni asertas hodiaŭ inter literaturistoj en Esperanto...

Kálmán Kalocsay: ... mi tion scias, pri kio temas: pri Peter Peneter. Ha, ha. Peter Peneter mortis en 1953. Tion vi povas legi en la...

RH: ... Esperanta Antologio.

KK: Ĉar li mortis kaj mi vivas, ni ne povas esti identaj, ĉu ne?

RH: Ĉu vi konis Peter Peneter?

KK: Jes, mi konis lin.

RH: Korespondis?

KK: Ne, li loĝis en Budapeŝto. Kaj... mi eĉ havas de li verkon.

RH: Sekretaj Sonetoj?

KK: Ne Sekretaj Sonetoj. Mi havas de li malgrandan epopeeton.

RH: Manuskriptan?

KK: Manuskripte, jes.

RH: Kio pri lia filo?

KK: La titolo estas: La Eksmonaĥino.

RH: Ĉu tiu manuskripto aperos?

KK: La manuskripto verŝajne ne aperos, ĉar ĝi estas ne nur erotika, sed krome eĉ blasfema. Do, mi tre malĝojas, ke mi ne povas ĝin... Se mi estus ĝin verkinta, mi ne estus ĝin tiel verkinta, ĉu ne. Ĉar mi kalkulis pri tio, ke oni eble volas ĝin eldoni kaj mi opinias, ke eĉ Kehlet mem ne eldonus. Se vi volas, mi donos al vi tute mallonge la enhavon.

Estis monaĥino, kiu estas, kiel mi diru, ĝenata de erotikaj sopiroj. Kaj foje ŝi ekrias, ke la diablo mem venu jam. «Mi tre ĝoje donus min al li.» Kaj en tiu momento Satano aperas. Kaj tiam al la Satano tre plaĉas tiu monaĥino, ĉar ŝi estas tre bela kaj ankaŭ al la monaĥino Satano, ĉar li estas tre interesa sinjoro, kompreneble. Kaj Satano fuĝigas ŝin el la monaĥinejo kaj ili vivas tiel 12 tagojn kune. Post 12 tagoj Satano devas ŝin forlasi, ĉar la 13an nokton ŝi jam ne povus elteni kaj ŝi mortus. Ĉar amori kun la Satano estas ĉiam tre laciga afero, ĉu ne.

RH: Hm.

KK: Kaj dum tiuj 12 tagoj, kompreneble, ili ne nur amaras, sed ankaŭ parolas inter si kaj Satano rakontas al ŝi la historion de Sodomo kaj Gomoro, kiel tio okazis. Kaj tio estas teruraj aferoj por rakonti. Ekz. ... Ĉu vi estas religiema homo?

RH: Mi estas teologo.

KK: Dio min gardu!²

RH: Por reveni al Sodomo kaj Gomoro: la konversacio inter Satano kaj la monaĥino.

KK: Jes, gardu, vin, eble mi mem estas la Satano³. Kaj nun mi koruptos vin. Do, tiel okazas aferoj, faras malĉastajn en Gomoro viroj kun virinoj kaj bestoj, ktp. Kaj tio estas tie skribita kaj tio okazas eĉ publike, tie estas kvazaŭ stadionoj, estas la rigardantoj, ktp.

RH: Am-fi-teatro.

KK: Kaj tiam Jaĥvo volas imiti tiujn, ĉu ne. Sed li ne havas en la ĉielo partneron por tio, ĉar li forgesis krei virinojn. La anĝeloj estas ĉiuj viroj: Gabrielo kaj Miĥaĉelo kaj Rafaelo ktp. Kaj li volus eĉ ŝteliri en Sodomon kaj Gomoron, inkognite, sed ne kuraĝas, ĉar Lucifero ĉie spionas pri li kaj li timas, ke Lucifero tion poste denuncos al Moseo kaj tiam Moseo ne havus respekton.

Do, tiaj aferoj enestas. Mi diris tute milde.

RH: Por reveni al la aŭtoro. Ĉu vi do kontestas, ke vi kaj Peneter estas la sama persono?

KK: Jes, kompreneble.

RH: Kiamaniere vi klarigas, ke oni serioze asertas tion? Ekz., lastatempe aperis studo de Duc Goninaz en *Norda Prismo*.

KK: Rigardu. Tiuj asertoj estas bazitaj sur filologiaj esploroj. Sed Peneter kaj mi tute bone konis unu la alian kaj li tre bone konis miajn verkojn, ĉar li ofte venis al mi kaj mi laŭtlegis miajn verkojn. Kaj en la Parnasa Gvidlibro vi povas eĉ legi, ke Peter Peneter kunmetis la malĉastan vortliston kaj por tio ni speciale dankas lin. Do, li tute bone konis mian stilon, do se mi efikis al li, tio tute ne estas mirinda afero.

RH: Ĉu do oni povus konkludi, ke la simileco de la stilo kaj tono inter *Sekretaj So-*

nictoj kaj *La Iaglibro* de Goethe kiun vi tradukis — ili aperis en la sama jaro — ŝuldiĝas al la influo de vi al Peneter?
 KK: Jes, kompreneble. Li konis la Goethe-tradukon.
 RH: Kio pri Peterido Peneter?
 KK: Mi ne scias. Eble li estas Maura.
 RH: Do tio povus esti pseŭdonimo?
 KK: Eble, ĉar Georgo Maura kaj Georgo Peterido...
 RH: Ĉu vi havis rilatojn al Maura?
 KK: Ne, ne, neniam.
 RH: Pri Maura estas simila afero kiel pri Peneter. Ankaŭ pri li oni multe asertas, ke Maura estas pseŭdonimo⁴.

Notoj:

¹ «Esperanto estis mia nobla hobia.» Reinhard Haupenthal interparolis kun Kálmán Kalocsay. En: *Norda Prismo* 17. 1972: 3, p. 131-140.

² Tie la konversacio iom forglitas al temoj religiaj kaj teologiaj, inter alie instruado en la rudimentoj de teologia-kristana-biblia tradicio.

³ Fone oni aŭdas la henan ridon de Tárkony.

⁴ Necesas atendi ankaŭ la duan morton de Maura por levi la vualon de tiu mistero.

II-a INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Kion nun travadas la Esperanto-Movado?

Kion signifas — el vidpunkto de la Esperanto-Movado — la *Fina Akto de la Konferenco de Helsinko*?

Kio estas “*ESPERANTISMO*”?

Kio estas de *La Lingvo Internacia* la tradicio, la socia komunajo kaj ties kulturo?

Kio estas la taskoj kaj la organizaj problemoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado?

Pri ĉiuj ĉi-supraj demandoj, kiuj nun pli kaj pli stariĝas en la spirito de ĉiuj sinceraj gesamideanoj, okazos prelegoj kaj debatoj en laborrondoj dum la II-a Internacia Esperanto-Konferenco — de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto 1976 — en Parizo.

Jam ne hezitu: sendu aŭ petu aliĝilon.

Tuttaga ekskurso al la kasteloj de Fontainebleau kaj Versailles Vizitoj tra la urbo:

“Parizo nekutima”, “Parizo monumenta”, kaj “Parizo nokta”.

Rimarkoj:

— La Konferenco okazos en la domo de “*La Société des Ingénieurs civils de France*”.

— Koresponda adreso de la Konferenco: ĉe s-ro A. Bourdeaux, 91/93 rue de la Chapelle, F-75.018 Paris.

— La SNCF (Ŝtata Societo de la Franca Fervojo) konsentas doni 20 %-rabaton al la konferencanoj (alilandaj aŭ ne) sur la franc-teritoria vojiro: petu la rabatilon.

49.^a KONGRESO DE SAT
Okazonta en Gotenburgo (Svedujo)
24 - 30 Julio 1976

Informoj ĉe la organiza adreso, S-ro Ivar Paulsson, Algatan 3, 171 33
SOLNA (Svedujo).

Edmond ROSTAND, franca poeto (1868/1918), debutis (1894) per poemkolekto «Les Musardises» (malfacile tradukebla: Gap-Vagajoj?), el kiu estas tirita la ĉi-suba peco. Sed li estas konata ĉefe pro siaj versformaj teatraĵoj, el kiuj la plej konataj estas: La Romantikaj, La Fora Princino, kaj ĉefe «Cyrano de Bergerac», La Aglido (Napoleono-filo), kaj «Chantecler». En ĉiuj liaj verkoj, krom lia romantikeco, reago kontraŭ la tiamaj naturalismo kaj simbolismo, rimarkindas, la vort-virtuozeco kaj la fajra, brila versarto. Ankaŭ lia edzino, Rosemonde Gérard, estis delikata poeto. Ilia dua filo, Jean Rostand, ankoraŭ vivanta, estas fama biologo.

LA ĈARUMO

Simile al tronprinco preninta kaŝan veston,
Kaj kiu por malkovri maljuston kaj moleston
Tra l' ŝtatoj de la patro esploron entreprenas,
Jesuo, foje, homan naturon ree prenas
Kaj kun diskret' forlasas Dipatran la Cielon
Por veni kaj travagi sur nian terparcelon.
Li... Dia Telemaĥo, kiun — olda Mentoro —
La bona Sankta Petro, sen la aŭreol' el oro
(Gi, brila, lin perfidus!), eskortas ordinare.

En iu tag', post longa marŝado trakampare,
Petro kaj la Sinjoro, dum vintro kaj malvarme,
Jen haltis en arbaro, en kiu folisvarmo
Fariĝis sur la grundo nur ŝima hum' sen formo.
Ja Sankta Petro volus nun sidi apud forno,
Varmigi siajn fingrojn; sed sola la kabano
Videbla en la foro, sub la tegment' el kano,
Ne klinis sub la vento la ŝveban fumostupon,
Kiu proponus hejmon, aŭ bonodoran supon.
Kaj sekve ĉi arbaro konvenis pli reale,
Tiom pli, ke la suno radiis iom pale.
Ĝi estis ne tre varma, ĉi vintra suno, vere,
Sed ja ne malŝatinda por sin varmigi pere.
Kaj Petro tute laca, uzinte la kalkanojn,
Sidiĝis, kaj etendis al suno siajn manojn
Kaj ilin elastigis en la kares' tepida.
Jesuo dume staris en iu pens' medita,
Sentante nek malvarmon, nek lacon, apud heĝo.

Subite Petro kriis: "Ho! Fil' de mia Reĝo!
Rigardu ĉi virinon! Rigardu, ho! kaj ridu!
Ĉu ŝi ne estas stulta, freneza eble, vidu!
Ŝi volas sunradiojn kolekti el la grundo!"

Jesuo ekrigardis. Jen, sub obstina frunto,
Maljuna in' kampara, kun strig-profilo seka;
Kaj tiu oldulino, kun la ĉarum' vastega
En mez' de l' pado staris, en loko ĝuste kie
Tra l' branĉoj sunradio lumetis apatie.

Kaj kiam radieto orumis la ĉareton,
 Tuj la virino provis la tre ridindan veton:
 Kunporti la sunpecon... kaj la timonojn ŝovis
 Kun hast', sed ĉiufoje kiam ŝi sin ekmovis
 De l' punkto atingita de la flirtanta lumo,
 La suno malaperis malice de l' ĉarumo.
 Kaj Petro multe ridis ĉe l' vid' de tiu ludo:
 Unue la kaptado de l' bela fajroguto
 El la veturileto momente heligita,
 Kaj poste l' fuĝ' rapida, kaj la mien' hezita
 De tiu povrulino sekundon senesprima,
 Sed baldaŭ reprovanta kun pacienc' senlima,
 Sed sen kompreno kial, tuj kiam en la ombro,
 Ŝi puŝas nun ĉarumon malluman kiel tombo!
 "Ho! kiel stulte! Dio! Ŝi dudek fojojn fidis!
 Jen ŝi nun ree provas!"

Kaj Petro laŭte ridis!

Sed interesigante Jesuo nun scivolas,
 Kaj post alproksimiĝo, la oldan alparolas:
 "Virin', vi kion faras? Ĉu saĝo al vi mankas?
 En ĉi sezono kruda, malvarm' nin ĉirkaŭflankas,
 Kaj mi do ne komprenas, ho kompatinda, ke vi
 Anstataŭ jenajn sekajn brancetojn pluke levi.
 Kunporti volas tiun radion nur tepidan!"

— "Por plezurigi mian infanon hejme sidan"
 Respondis la virino. "Mi la avino estas
 De povra knab' malsana, al kiu nur mi restas.
 Ĉi-vintre la patrino kaj patro falis mortaj.
 Labori?... Miaj brakoj fariĝis tro malfortaj.
 Mi povas nur spikumi... laboro efemera!
 L'infano baldaŭ mortos en nia dom' mizera,
 Eĉ ne gustinte tiujn dolĉaĵojn, sukajn frandojn,
 Kiuj ankoraŭ ravas la etajn mortigantojn.
 Avino ne povante la nepon priregali...
 Terure! Kaj mi vere ne sciiis, kion fari.
 Sed tuj post la vekigo li diris ĉi-matene:
 'Ho, mi tre ĝojus havi iom da suno ene!
 Ĉar, ho ve! la kabanon neniam sun' envenas,
 Kaj daŭre la knabeto je la taglumo senas.

Vidante, ke ĉi tie abunde sun' petolas,
 Mi dikan pecon da ĝi kolekti por li volas."
 Kaj la maljunulino refaris siajn provojn.

Se kortuŝita, Petro kuntiras siajn brovojn.
 Li diris: "Kiel stulte! Ĉu vere ŝi ne vidas,
 Do, ke je ĉiu paŝo la suno forrapidas!
 En ĉi maljunan cerbon ne eblas saĝpenetro!
 Nenion ŝi komprenas!"

Jesuo nun al Petro,
 Penseme meditinte pri ĉio, flustre ŝovas:
 "Ne eblas scii, kion la am' de l' povraj povas!"
 Sed Petro ne komprenis perfekte ĉi parolon
 Kaj diris: "Ĉi virino perdis la memkontrolo!
 Sinjoro, ŝi frenezas!..." Sed vorto al li mankis
 Subite, kiel iam, kiam la koko kantis:
 Ĉar nun la olda marŝis kun bril' en la okuloj,

Kaj la radioj restis inter la kvar tabuloj,
 Kaj en la ombro ili plu brilis kiel oro,
 Kaj, kvazaŭ ŝi transportus amasojn da trezoro,
 Sen miro, l' oldulino, silenta kaj feliĉa,
 Kun si forportis sunon en la ĉarumo kriĉa.

el la franca: Roger BERNARD

VIDA POEMO

Originalo de Ernst JANDL

Identa traduko de Reinhard HAUPENTHAL

Interpreta noto

La teksto apartenas al la t.n. grupo de la "vidaj poemoj" (formantaj sekcion de la konkreta poezio) distingigantaj de la ceteraj tekstoj precipe per la skribo-bildo: la lingva kaj la vida elementoj kune konstituas la totalan eldiron de la teksto. La lingva komponento de tiuj vidaj poemoj estas ekstreme reduktita; per tio la vida komponento akiras egalan signifon.

Jandl diras pri la intenco de sia kreado: "Celo de mia laboro, hodiaŭ kiel iam, estas funkciaj, vivaj, efikaj poemoj, direktataj — de kiu ajn materialo ili eliras kaj en kiu ajn formo ili elpaŝas — direktataj de tendencoj kaj inklinoj, ĝojo kaj kolero en mi. Kion mi volas, tio estas poemoj ne lasantaj fridulojn".

Nia poemo konsistas el kvar liter-kvalitoj, kiuj, kunigitaj, rezultigus la vorton *nihil*. Dank al la subskribo *escalator* (eskalatoro) la rigardanto provas asociaciojn inter la komponentoj de la teksto kaj eskalatoro. Laŭ la vida impresio la literoj interpreteblas kiel homoj sur eskalatoro, unuj devancantaj, aliaj postrestantaj la amason. La rilato inter la i-literoj kaj la ceteraj montras, ke nur la litero i signas vokalon, t.e. sonon kun "voĉo" (latine: vox, vocis) sufiĉe memstara por servi apoge al la aliaj (la konsonantoj). Kontraste al la konsonantoj la vokaloj distingigas per la potenciala kapablo voki, krii, ĉu averte, ĉu proteste. Tial i en la son-socio reprezentas grupon da sonoj kun pli individua, pli memstara pozicio ol n, h, l.

Konkrete: la i-vokaloj malhepas estiĝon de la vorto *nihil* (nenio) per sia devanco kaj postigo; aliflanke, per sia enamaseco ili kaŭzas, ke la resto estas ekkonebla kiel nihilfragmentoj.

Transponante tiujn observojn sur la eskalatoron kiel instrumenton de antaŭen— kaj supren-moviĝo kaj sekve kiel signon de historia progreso kaj prospero, oni povas diri, ke la aŭtentavoĉaj individuoj malhelpas la amasiĝon kaj ke estu "nenio" en la historio. Interne de la amaso ili kontribuas al tio, ke la unuopaj membroj ne staru izolate (kp. la mezan kolumnon) ĉe kio la dialektika tensio de integriĝo kaj izoligo devas esti konservata.

Lige kun la latina *nihil* ne malgravas, ke *i* estas la imperativo de *ire*, ke *i* do signifas "iru!". *i* havas do apelan karakteron ne stagni sed moviĝi mem en la moviĝo de la tempo, t.e. agi kaj malhelpi, ke la ĝenerala moviĝo estu *nihil*.

LA PANO

Subite ŝi vekigis. Estis la dua tridek. Ŝi cerbumis, kial ŝi vekigis. Ho jes! En la kuirejo iu puŝigis kontraŭ seĝo. Ŝi aŭkultis al la kuirejo. Estis trankvile. Estis tro trankvile kaj kiam ŝi glitigis la manon al la apuda lito, ŝi trovis ĝin malplena. Jen, kio kreis la apartan silenton: mankis lia spiro. Ŝi levigis peze paŝante tra la tenebra loĝejo al la kuirejo. En la kuirejo ili renkontigis. Estis la dua tridek. Ŝi vidis, ke io blanka staras ĉe la kuireja ŝranko. Ŝi lumigis. Ili staris vid-al-vide en nokta ĉemizo. Nokte. Je la dua tridek. En la kuirejo.

Sur la kuireja tablo staris la pan-telefono. Ŝi vidis, ke li detranĉis por si panon. La tranĉilo ankoraŭ kuŝis apud la telero. Kaj sur la tablotuko kuŝis paneroj. Kiam nokte ili enlitigis, ŝi ĉiam purigis la tablotukon. Ĉiuvespere. Sed nun sur la tablo kuŝis paneroj. Kaj jen kuŝis la tranĉilo. Ŝi sentis, kiel la kahela frido lante ŝin ascendas. Kaj ŝi deturnis la rigardon de la telero. «Mi pensis, ke jen estas io», li diris ĉirkaŭrigardante en la kuirejo.

«Ankaŭ mi aŭdis ion», ŝi respondis trovante, ke nokte en la lit-ĉemizo li aspektas jam sufiĉe olda. Tiel olda kiel li estis. Sesdek tri. Dumtage kelkfoje li aspektis pli juna. Ŝi jam aspektas olda, li pensis, en la ĉemizo ŝi aspektas jam sufiĉe olda. Sed eble pri tio kulpas la haroj. Nokte ĉe virinoj ĉiam kulpas la haroj. Ili subite kaŭzas oldecon.

«Vi devintus meti ŝuojn. Nudpiede sur la fridaj kaheloj. Vi malvarmumos.»

Ŝi lin ne rigardis ne povante toleri lian mensogon. Lian mensogon post trideknaŭjara edzeco.

«Mi pensis, ke jen estas io», li diris duan fojon rigardante same stulte de unu angulo al la alia, «mi aŭdis ion. Kaj mi pensis, ke jen estas io».

«Ankaŭ mi ion aŭdis. Sed certe okazis nenio.» Ŝi deprenis la teleron de la tablo kaj forpuŝis la panerojn de la tuko.

«Ne, certe okazis nenio.» Li eĥis necerte.

Ŝi helpis lin. «Venu do. Certe tio estis ekstere. Venu, enlitigu. Vi malvarmumos. Sur la fridaj kaheloj.»

Li rigardis al la fenestro. «Jes, tio certe okazis ekstere. Mi pensis, ke estas ĉi tie.»

Ŝi levis sian manon al la lum-ŝaltilo. Mi devas estingi la lumon, alie mi devas rigardi la teleron, ŝi pensis. Mi ja ne rigardu la teleron. «Venu», ŝi diris estingante la lumon, «certe tio okazis ekstere. La defluilo en la vento frapiĝas ĉiam al la muro. Certe estis la defluilo. En la vento ĝi ĉiam frapadas».

Ili palpe iris tra la tenebra koridoro al la dormoĉambro. Iliaj nudaj piedoj klakis sur la planko.

«Ventas», li diris. «Ventis jam la tutan nokton.» Kuŝante en la lito ŝi diris: «Jes, ventis jam la tutan nokton. Certe estis la defluilo».

«Jes, mi pensis, ke tio okazis en la kuirejo. Certe estis la defluilo.» Li tion diris kvazaŭ en duondormo.

Sed ŝi rimarkis kiel malvera sonis lia voĉo, kiam li mensogas. «Estas malvarme», ŝi diris kun softa oscedo, «mi rampos sub la kovrilon. Bonan nokton». «Nokton», li ankoraŭ diris: «Jes, jam estas vere malvarme».

Poste ekestis silento. Post multaj minutoj ŝi aŭdis, ke li mallaŭte kaj singarde maĉas. Ŝi intence spiris forte kaj regule, por ke li ne rimarku, ke ŝi ankoraŭ viglas. Sed lia maĉado estis tiel regula, ke ŝi lante endormiĝis.

La postan vesperon, kiam li rehejmiĝis, ŝi ŝovis al li kvar pantranĉojn. Antaŭe li povis manĝadi nur tri.

«Vi trankvile manĝu kvar», ŝi diris forirante de la lampo. «Mi ne povas toleri tiun ĉi panon. Manĝu unu plian. Mi ne bone ĝin toleras.»

Ŝi vidis lin kliniĝi profunde al la telefono. Li ne levis la rigardon. En tiu momento ŝi kompatis lin.

«Ne eblas, ke vi manĝu nur du tranĉojn», li diris kontraŭ sia telero.

«Tamen. Vespere mi ne bone toleras la panon. Manĝu do.»

Nur post tempeto ŝi altablighis sub la lampo.

El la germana tradukis
Reinhard Haupenthal

OMAGĖ

Kun profunda bedaŭro ni informiĝis pr la forpaso de du hispanaj esperantistoj kies laboro favore al Esperanto, ĉiu en sia medio, estis ekzemplo de sindediĉo.




FRANCISCO AZORIN

Varsovio 1959. S-ro Azorin en amika
babilado kun hispanaj esperantistoj

En Meksikio, kie li loĝis de antaŭ pluraj jaroj, S-ro Francisco Azorín, forĝinto de tuta generacio de hispanaj esperantistoj, forpasis.

Kiam mi legis la dolorigan informon, mia penso flugis al Varsovio dum la Universala Kongreso kaj en mian menson venis la tago, kiam la grupo de hispanaj samideanoj organizis festeton, kun partopreno de pluraj alilandanoj, omaĝe al li.

Kiel vera kavaliro de humaneca internaciismo, S-ro Azorín pasis tra la vivo bonfara, kaj fine sekvis la vojon al eterna ripozo. Por li tio signifas atingi la superan celon, sed por ni, kiuj havis la ĝojon esti liaj geamikoj, tio kaŭzas profundan doloron.



ANTONIO CRIACH

La 14-an de aprilo forpasis en Calella de la Costa (Barcelona), S-ro Antonio Criach, kies altira personeco kaptis la simpatian kaj respekton de ĉiuj pro siaj sentoj homaraj kaj sincera esperantismo.

Li apartenis al tiaj sindonaj, klarvidaj homoj —veraj apostoloj de idealo— kiuj de la unua momento komprenas la gravecon de la problemoj kaj silente, klopodas helpi ĝis atingo de la celo. Multe mi povus paroli pri lia lojaleco kaj morala apogo.

Li bone sciis ke la amon konsistigas la sindono al aliuloj, pro tio, trenita de sia amo al ĉiuj homoj sen mezuro sin donis, kaj lia hejmo ĉiam estis aperta por ĉiuj kiuj lin bezonis, kaj ĉefe por la tutmondaj esperantistoj, kiuj bone konis la gastamecon de gesinjoroj Criach.

LA ANTAŬJUĜOJ!

En ĉi tiu serio da artikoloj estos prilumitaj la plej gravaj el tiuj, kiuj bremsas la normalan disvastigadon de la lingvo.

I PRI LA LINGVO KIEL ESPRIMILO

La formiĝo de lingvo estas la natura rezulto de jarcenta procezo interne de popolo: lingvo artefarita ne povas esti vivanta.

Kiel bela kaj nova tia aserto! Jam la 4-an de septembro 1907 en la franca gazeto "Le Gaulois" Daudet skribis: «*Cia lingvo de artefara kaj laŭvola formiĝo malhavas animon kaj sekve viv-principon. Ĝi taŭgas por aŭtomatoj.*» Kaj same sub la plumo de Ernest Gaubert oni povis legi el lia verketo titolita "La stultajo esperantista": Esperanto «*ekzercas nur la memoron kaj ne la intelekton. Ĝi estas mekanika ĉar artefarita...*» Jen do laŭ bone konata melodio: iu ajn arta lingvo estas nebla!

Nu unue la kvalifiko "artefarita" meritas reteni nian atenton precipe ĉe la prilumo de la lingvistikaj laboroj: ĝi estas koncerne lingvon nocio tre relativa kaj jam de longe tre diskutata. Dezirindas antaŭ ĉio senmitigi la ambiguecon! Ne konfuzi la unuan sencon de la termino "farita laŭ arto" kun la aktuala, kiun ĝi plej ofte prezentas en pluraj lingvoj "farita por doni nuran impreson"; la unua estas tiu de Kartezio kaj Lejbnico, kiam ili rekomendas lingvon facilan ĉar simpla kaj simplan ĉar regula, la dua estas tiu de la okultrompilo farita nur el ŝajno! Plie ne plu povas esti dubo post Ferdinand de Saussure, ke la lingva signo estas origine konvencia se poste tradicia. Cetere Rabelezo jam skribis (III, 19): «*Estas troigo diri, ke ni havas lingvon naturan; la lingvoj ekzistas pro starigoj arbitraj kaj plaĉoj de la popoloj...*» Kaj same Joachim du Bellay: «*Cia ilia efikeco naskiĝis de la volo kaj kaprico de la homoj.*» La du francaj verkistoj — estas ja vero — devis siatempe batali ankaŭ kontraŭ la malŝato de la franca lingvo fare de la kleruloj, pli aparte de tiuj intelektuloj pretendantaj posedi kvaŝaŭ denaskan scion! Al tiuj verkistoj de la XVI-a jarcento eĉas Antoine Meillet: «*Fakte la lingvoj ne estas objektoj havantaj aŭtonoman materian ekziston kaj evoluantaj per si mem. Lingvo estas institucio apartenanta al la socia kolektivo, kaj la modifoj, kiujn ĝi trapasas, estas ligitaj al la historio de tiu kolektivo.*» Kaj Max Müller: «*Tio, kion ni kutimas nomi lingvoj, nome la literaturaj idiomoj de Grekio, Romio, Hindio, Francio, Hispanio... estas prefere konsidereblaj kiel naturaj formoj de la parolo.*»

Cia beletra lingvo efektive fariĝas — laŭ sia konsisto mem — el artefara procezo: la kreantoj, elektante kaj polurante siajn esprimilojn, uzas artan farecon en la unua vortosenco, kaj kiel diris s-ro Chamard en sia tezo (p. 111), se ili havas malmulte da efiko sur la vorttrezoron (kvankam multe estus dirinda pri tio koncerne la francajn verkistojn de la XVI-a jarcento!), ili havas konsiderindan efikon sur la sintakson, kiun ili knedas laŭ sia genio. Tiuj de La Plejado kaj multaj aliaj tiel forĝis la belan francan lingvon. Kiu ankoraŭ imagus, ekzemple, ke la famaj reguloj pri la akordo de la francaj participoj estas se ne denaskaj tamen naturaj al la infano? Kiu konsiderus nulaj la rolojn de Malherbe kaj Vaugelas? Kaj ĉu vi ne opinias, ke ĉia fremda lingvo unuavide ŝajnas sistemo tre artefarita? Verdire ĉiuj tiaj antaŭjuĝoj rezultas el aprioraĵo devenanta de la iamaj disputoj pri la lingva origino, interalie kian lingvon diecan povis ja paroli Adamo kaj Eva en la paradizo; kiu antaŭjuĝo senĉese konfuzas la denaskan naturecon kaj la akiritan alkutimiĝon, ĝuste tion kion Blaise Pascal nomas la "dua naturo"!

Tial des pli artefarita estas lingvo, ju pli ĝi estis prilaborita per la plumo de multaj verkistoj, kiel skribis Boileau:

«*Multfoje sur teksilon remetu vian verkon,*

«*Poluru ĝin senĉese kaj repoluru ĝin.*»

— ju pli ĝi estis riĉigita ĝuste per kulturaj valoroj, ĉar lingvo ne estas kultura en si mem pro oni ne scias kia naturdotiteco aŭ privilegio: ĝi ja fariĝas tia nur dank'al siaj verkistoj kaj uzantoj. Kaj se la lingvoj diritaj "de granda civiliziteco" fariĝis klerecaj lingvoj, tiu prilaboriteco ne estiĝis sen peno, kiel atestas "La Defendo kaj Ilustrado de la franca lingvo" de Joachim du Bellay en 1549: «*Mi ne povas sufiĉe mallauda la stultan arogantecon kaj temerecon de kelkaj en nia nacio, kiuj, estante nur grekoj kaj latinoj, malŝatas kaj forjetas per brovmoŭo pli ol stoika ĉiajn aĵojn skribitajn en la franca; kaj mi ne povas sufiĉe miregi pro la stranga opinio de kelkaj scienculoj, kiuj opinias, ke nia vulgara (lingvo) estas malkapabla je ĉiaj beletraĵoj kaj erudicio, kvazaŭ inventaĵo nur pro la lingvo devus esti juĝita bona aŭ malbona...*» Kion Cicero mem rimarkis ankaŭ al tiuj el siaj samtempuloj, kiuj amegis nur la grekojn (De Fin. I, 1, 1): «*Erunt tiam, et hi quidem eruditi græcis letteris, contemnentes latinas, qui se dicant in græcis legendis operam consumere malle.*»

Nu la Lingvo Internacia de d-ro Esperanto iel prezentigas kiel klareca lingvo, ĉia estas la komuna franca aŭ angla, — kiel lingvo, kiu surbaze de la principoj proponitaj en 1887 de d-ro L. L. Zamenhof iom post iom viviĝis kaj disvolviĝis en unu socia komunajo ja juna sed jam de pli ol kvar generacioj vivanta, kvankam dissemata al ĉiuj anguloj de la terglobo. Esperanto estas la sola lingvo vere internacia, kiu estas tia "laŭ konsisto kaj destino", prilaborita jam de baldaŭ 90 jaroj spite du mondmilitojn, kiuj ĉiujfoje neniiĝis ĝiajn lingvoinstituciojn (kio estas per si mem ne la plej eta pruvo de ĝia viveco!).

Tial svingi kontraŭ tia vivanta lingvo la kriterion de "artefariteco", kiel faras multaj misfamigantoj, eĉ similigante ĝin al ia "kodo" aŭ "meccano" kvazaŭ kreita el nenio, ĉu tio ne estas simple montri al la okuloj de la mondo sian nescion? La monstro de tia nescio estas des malpli pardoninda, ke ĝi tro ofte restas la faro de universitatoj! Oni cetere povas juĝi la valoron de tiaj kritikoj, konstatante, ke ili ne malhavas en si mem kontraŭdirojn: unu riproĉas al la lingvo ian "laŭvolan" formiĝon, dum la alia pretendas, ke ĝi *«ekzercas nur la memoron kaj ne la intelekton»!* Ĉu ne strange, ĉar kiamaniere tio, konstruite de la homa volo, ne ekzercus la menson?

Sed tio ĉi estas nura komenco!

(daŭrigota) J. T.

DIALOGO KUN LA LEGANTOJ

ĈU NI BEZONAS ENERGION EL ATOMREAKTOROJ?

La okcident-germana ĉiutaga ĵurnalo "Die Welt" (La Mondo) de la 18.2.76 raportas sur p. 15 la jenon:

«Post 2-3 jaroj la GFR scios, ĉu eble ĝi povos fariĝi unu el la plej grandaj produktantoj de ter-gaso.

Grupo de germanaj sciencistoj ĉe la teknika altlernejo de AACHEN, gvidata de prof. Werner Wenzel estas la komisiito de projekto de l' federacia esplorministerio, dotita per 6,5 milionoj da markoj.

La grupo esploras, ĉu eblas la produktado de gaso el karbo *en subteraj tavoloj de pli ol 1500 m* kaj ĉu la procedo estos sufiĉe malmultekosta.

La ŝancoj evidente estas bonaj: Prof. Wenzel patentigis procedon, kiu povus venki la ĝisnunan skeptikan sintenon de la min-ekspertoj kontraŭ la subtera gas-produktado.»

Se la projekto realigeblas, la GFR posedus fonton de plej-koncentrita karbenergio, kiu laŭ la nuna karboproduktado sufiĉus por 1500 jaroj.

Alia raporto:

Libere laŭ "Der Spiegel" (La Spegulo) de la 8.3.76, p. 178 rilate produktado de tre koncentrita benzino el transformado de metanolo:

«Metanolon (metil-alkoholon) oni jam produktadas en kvanto de milionoj da tunoj jare.

Nun, pere de relative nova kemia metodo, nomata "Molecular Engineering" la Mobil-Oil-konzerno evoluis katalizatoron, per kiu oni povas transformi metanolon *en unu sola proceda paŝo* en benzinon de supera kvalito (de 90-100 oktanoj).

Eĉ la aldonado de plumbio —por atingi sufiĉe longan funkciadon de la motoroj— ne plu necesas. Krome ne nur karbon, sed ĉiun krudmaterialon, el kiu oni povas produkti metanolon, tiamaniere oni povas transformi en altkvalitan benzinon.

Plej verŝajne jam inter 1980-90 la prezo de l' petrolo estos tiom alta, ke la nova metodo gajni altkvalitan benzinon fariĝos sufiĉe profitodona. Tiam preskaŭ neelĉerpebla fonto de energio disponeblas.»

Ambaŭ informoj kune montras, ke tre verŝajne ni ne bezonos energion el atomreaktoroj. Ĉu?

H. J. Grimm

Car la temo proponita de S-ro Grimm havas nedubeblan intereson, ni invitas niajn legantojn, kunlabori al ĝi per alsendo de koncernaj informoj kaj ideoj.

Red.

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Redaktas Prof. D-ro Ivo Lapenna
N-ro 3

3.1 *Pliaj kontraŭneŭtralecaj dokumentoj*

3.1.1 Enkonduka rimarko. — En la verko *Hamburgo en Retrospektivo (HeR)* estas prezentitaj multnombraj dokumentoj pri la kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA. Cap. 3 de la verko enhavas detalan analizon de la Programo de Bulgara Esperantista Asocio (BEA), plu aliĝinta asocio de UEA. Por bone kompreni la politikan kaj kontraŭneŭtralecan materialon, kiu estos prezentita kaj analizita sube, estas necese atente tralegi *HeR*. Utilas enkonduke rimarkigi, ke la Statuto de Bulgara Esperantista Asocio, kiel laste reviziita en 1972 dum la kongreso en Smoljan, la sama kiu akceptis la nunan Programon de BEA, eksplicite mencias kiel unu el la celoj de tiu organizaĵo "eduki siajn membrojn en la spirito de patriotismo kaj proleta internaciismo, de alligiteco al tendaro de l'socialismo...".

3.1.2 Programo de Centra Laborrondo Esperanto de GDR. — Per sia letero de 01.07.1975, adresita al la Estraro kaj Komitato de UEA, kaj atinginta la aŭtoron de *HeR* post la publikigo de tiu verko, Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko (CLEK) proponis, ke la Komitato de UEA decidu dum siaj kunsidoj en Kopenhago (1975) pri ĝia aliĝpeto "kiel kolektiva membro de UEA" ekde 01.01.1976. Al la propono estis aldonitaj diversaj dokumentoj, el kiuj la plej grava estas la "Gvidprincipoj por la laboro de la esperantistoj en Kulturligo de GDR". Sur la unua paĝo troviĝas jena baza principo:

«La esperantistoj de GDR utiligas la Internacian Lingvon por la ideologia batalo kontraŭ imperiismo (de la okcidenta mondo, kompreneble — rim. de la red.). Ili decide kontraŭas ĉiujn variantojn de anti-komunismo, reviziismo, konverĝa teorio kaj neŭtralismo. Ili aktivis por akceptigo de paca kunezistado inter diverssociaj ŝtatoj (v. p. 50 de *HeR*), subtenas la antiimperiisman liberigan batalon kaj pledas por pli larĝa uzo de Esperanto serve al la paco kaj progreso. Ili kunlaboras kun ĉiuj progresivaj lingvoamikoj kaj organizaĵoj, kiuj sekvas la samajn aŭ similajn celojn.» (Substrekitaj de la red.)

Temas pri tiu sama CLEK, en kies ŝtato la importado de la revuo *Esperanto* kaj de aliaj publikadoj de la neŭtrala ĝishamburga UEA estis malpermesita kaj la publikadoj mem estis konfiskataj.

Laŭ la Protokolo de la kunsidoj de la Komitato de UEA en Kopenhago, la aliĝpeto de CLEK eniris en la tagordon kiel p-to 3lc. Pri tiu aliĝpeto la Komitato diskutis sabaton, jaŭdon kaj denove sabaton de la kongresa semajno, sed vane oni serĉas en la Protokolo iun ajn informon pri tiuj diskutoj. Partopreninto informis, ke line oni prokrastis la decidon pri tiu aliĝpeto, sed en la Protokolo troviĝas absolute nenio pri la decido prokrasti la decidon. Fakte, tio estas plia falsado de la okazintaĵoj en la Komitato, ĉar gravaj faktoj estas prisilentitaj. Ankaŭ la septembra *Esperanto* raportis, ke "pliaj landaj asocioj petis aliĝon al UEA", sed diris nenion pri

la sorto de tiuj aliĝpetoj. Plia prisilentado de gravaj faktoj.

Evidente, la Komitato de UEA, en sia nuna konsisto, ne povis rifuzi la aliĝpeton de CLEK, kies programo estas klare politika kaj tial evidente kontraŭa al art. 13 kaj 4 de la Statuto de UEA, sed ĝi ankaŭ ne kuraĝis akcepti tiun politikan organizaĵon kiel aliĝintan asocion, verŝajne pro la ekzisto de *HeR*. Tial la decido estis prokrastita. Fakte, la aliĝpeto devis esti tuj rifuzita konforme al la Statuto.

3.1.3 Programo de CEA por la jaroj 1976-1980. — Dum la Dua Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, okazinta komence de februaro 1976 en Prago, estis akceptita la Programo de CEA por la jaroj 1976-1980. *Starto*, organo de CEA, publikigis en n-ro 1/1976 sur p. 4 koncizan resumon de la Programo. La publikigita resumo estas fakte falsado, ĉar ĝi komplete kaŝas la politikan karakteron de la Programo. Anonima amiko de la neŭtrala Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio sendis al la redaktoro de tiu ĉi rubriko la kompletan tekston. Jen resumo de la ĉefaj punktoj kun originalaj citaĵoj el la Programo mem. (Substrekitaj de la red.)

Jam sur la unua paĝo estas formulita la baza principo de agado:

«Kiel anoj de ŝtato, kiu konstruas modernan socialisman socion, bazitan sur la principoj de socialisma proprieto kaj proletara internaciismo sub la gvido de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, ni klopodos per *idee-politika* kaj organiza agado pri edukado de niaj anoj al konscia kaj aktiva ŝtataneco, al respektado de la principoj de demokratia centrismo kaj internacia solidareco en la spirito de la rezolucioj de la 15-a Kongreso de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio.»

Sur la sama unua paĝo troviĝas direktivoj por "efika kunlaboro kun esperantistaj organizaĵoj eksterlande, unuavice kun Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj precipe en la landoj de socialisma socio". La celo estas ne daŭrigi la brilajn tradiciojn de la neŭtrala Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio, sed la "progresemajn tradiciojn de la laborista Esperanto-Movado". Pri la vera senco de la vortoj "progresemaĵoj tradicioj de la laborista Esperanto-Movado" v. 2.1 de *HeR*. La fina celo de tiu tuta agado estas "*plifortigi la aŭtoritaton de la socialismaj landoj en la tutmonda Esperanto-Movado*", alivorte eĉ pli firme ekregi en UEA.

En la p-to 3 la Programo instrukas pri la rolo de la Bulteno de CEA "kiel organiza kaj informa ligilo kaj samtempe kiel *idee-politika helpanto* de la Asocio al *sistema edukado* de lokaj grupoj kaj ĉiuj anoj en la spirito de principoj de socialisma patrioteco kaj proletara internaciismo".

La p-to 5 de la Programo rilatas al UEA kaj MEM, kiuj estas metitaj sur la saman nivelon kun la sama rango:

«En kunlaboro kun la kulminaj /superaj, rim. de la red./ internaciaj Esperanto-Organizaĵoj (UEA kaj MEM) atente sekvi laŭ la ebloj la disvastigon de nia anaro kaj la reprezentigon en la gvidaj organoj de la menciitaj organizaĵoj. Samtempe en la kadro de MEM kaj ankaŭ en duflankaj rilatoj kun la Esperantaj asocioj de socialismaj landoj, kaj ankaŭ en la organoj de UEA, atribui al la komuna batalo por la paco kaj por plialtigo de la prestiĝo de UEA en internacia skalo.»

Kompreneble, ĉiuj prudentaj homoj en la mondo deziras pacon, sed en la Programo de CEA — same kiel en la programoj kaj praktikaj agadoj de la aliaj Esperanto-organizaĵoj en la blokaj landoj — ne temas pri tiu paco, sed pri paco laŭ la koncepto de MEM, siavice subigita al la Monda Packonsilio, siavice instrumento de la nuntempa soveta politiko. Tion aperte difinas la p-to 6 de la Programo:

“Kiel centron de la tuta agado de CEA kaj de ĉiuj niaj esperantistoj estas necese rigardi la aktivan laboron en la sfero de la paca movado. Ĝia iniciatanto plue fariĝos /plu estos, rim. de la red./ la porpaca sekcio de CEA, kiu okupas gravan pozicion kiel ĉenero de MEM, pere de kiu ĝi kunlaboras kun Monda Packonsilio... La sekcio atingas rimarkindajn rezultojn ankaŭ en konkreta kunlaboro kun Ĉeĥoslovaka Porpaca Movado en la batalo kontraŭ faŝismo en Ĉilio kaj kontraŭ imperiismo de Israelio /Israelo/ en arabaj landoj...”

Kiel oni vidas la “israela imperiismo” troviĝas ankaŭ en tiu ĉi Programo de landa asocio aliĝinta al UEA, al kiu apartenas ankaŭ Esperanto-Ligo en Israelo. Kiom longe ĝi ankoraŭ toleros tian politikan programon kontraŭ sia propra lando en la sino de UEA?

En la p-to 7 de la Programo estas pritraktitaj la kontaktoj inter la Junulara Komisiono de CEA kaj la Centra Komitato de la Asocio de Socialista Junularo en Ĉeĥoslovakio. La tasko estas — asertas la Programo — eduki la junularon al “praktika esprimado kaj validigo de la ideoj de socialisma patrioteco, proletara internaciismo kaj klasa koncepto de la mondo kaj ties problemoj”.

Sajnas, ke eĉ dum amuziĝoj la esperantista junularo devas esti prilaborata en la senco de “proleta internaciismo” kaj “klasa koncepto de la mondo”, ĉar la Programo eksplicite instrukas, ke dum la amuziĝo de la junularo” necesas samtempe “edukadi el ties vicoj novajn adeptojn por sinsekva transprenado de pli superaj respondecaj taskoj kaj funkcioj en la tuta Esperanto-Movado”. La p-toj 8-10 de la Programo rilatas precipe al la laboroj de la “metode-propaganda” kaj “politike-eduka” komisionoj de CEA kun la celo “daŭre plialtigadi la politike-idean nivelon de la Movado kaj ties celtrafaj metodoj kaj formoj de la gvidado kaj propagando”. Subvenciojn de la ŝtato “oni devus en la estonteco uzi por celtrafa financado de la gazeto *Paco*, propagandaj eldonaĵoj pri CSSR, politike-eduka agado kaj klerigado de CEA funkciuloj”.

En la fina parto la Programo atakas la “esperantisman sektismon”, kio en la lingvaĵo de la Programo evidente egalas al “abstrakta internaciismo, neŭtralismo, pacifismo, kosmopolitismo kaj aliaj malutilaj devojiĝoj” en la Programo de la Bulgara Esperantista Asocio (v. 3.2 de *HeR*, precipe p. 21). Ĝi aperte instrukas:

“La ideoj, politikaj kaj porlaboraj prin-

cipoj de la agado, kiuj estas entenataj en ĉi tiu Programdeklaro, formas la fundamentan direktivon kaj gvidilon, kiun ni en la proksima periodo sekvos...”

3.1.4 *Konciza komento.* — Ne necesas esti politika sciencisto por kompreni, ke la supraj dokumentoj, same kiel la materialoj prezentitaj en *HeR*, estas nete politikaj kaj evidente kontraŭaj al la principo de politika neŭtraleco en la senco difinita en la Statuto de UEA. Tamen, por plene kompreni la tutan sennon de tiu politika agado necesas scii iom pli pri la politika signifo de la konceptoj de “paca kunekzistado”, “proleta internaciismo”, “konverĝa teorio”, “klasa koncepto de la mondo” k.a., abunde utiligitaj ankaŭ ekster la analizitaj dokumentoj. Ĉi tie utilas nur menci, ke la koncepto de “proleta internaciismo”, kiel formulita en la nuntempaj politikaj kaj internaciuraj doktrinoj de Soveta Unio, estas malakceptitaj eĉ de pluraj komunistaj partioj (ekzemple la ĉina, jugoslavia, franca, itala k.a.) por ne paroli pri partioj kun aliaj politikaj programoj. La principo de “proleta internaciismo” kaj la kunligitaj principoj de “kunekzistado” kaj “klasbatalo” estas ekskluzivaj. Ili kontraŭas ne nur al la principo de neŭtraleco de UEA, sed ankaŭ al ĝia fundamenta celo: “plifaciligi la ĉiuspecajn spiritaĵojn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo” (art. 3.b de la Statuto). En 3.2 de *HeR* estas donitaj kelkaj difinoj pri la menciitaj konceptoj. Interesiĝantoj kun scio de la angla trovos pliajn informojn pri faktoj kaj analizojn en du artikoloj de la redaktoro de tiu ĉi rubriko: (i) *The Legal Aspects and Political Significance of the Soviet Concept of Co-existence*, publikigita en *International and Comparative Law Quarterly*, julio, 1963, p-oj 737-777; (ii) *The Soviet Concept of 'Socialist' international Law*, publikigita en *The Year Book of World Affairs*, 1975, p-oj 242-264. Ambaŭ publikaĵoj estas certe troveblaj en universitataj bibliotekoj.

3.2 *Ankoraŭ pri la aŭtoraj rajtoj de "Esperanto en Perspektivo"*

En 2.5 de tiu ĉi rubriko estas donitaj koncizaj informoj rilate la aŭtorajn rajtojn de la verko *Esperanto en Perspektivo*. En la fino estis dirite, ke “ekzistas espereto, ke la nuna Estraro de UEA konsciigos pri sia jura respondeco almenaŭ rilate mian rajton disponi laŭ mia bontrovo pri miaj materiaj kaj intelektaĵaj propretoj”. Sajnas, ke eĉ tiu espereto nun malaperis. Sekve, mi informas ĉiujn interesiĝantojn, ke mi mem konservas ĉiujn miajn aŭtorajn rajtojn kaj ke, konforme al mia letero de 14.02.76 al la prezidanto de UEA, mi malpermesis la publikigon de la anoncita serio, kiu celas kompletigadi la verkon *Esperanto en Perspektivo*. Mi ripetas publike, ke mi estas preta konsideri permeson, se la nuna gvidantaro de UEA informos min pri kio precize temas.

Ivo Lapenna

EN LA DANA ESPERANTO-MOVADO

DU PROPONOJ KAJ TIES SEKVOJ

Propono al la ordinara ĝeneralkunveno de DEA en 1976, prezentita de H. V. Rasmussen

DEKLARO PRI NEŬTRALECO DE DANA ESPERANTO-ASOCIO

Ĉar de certaj flankoj estas esprimita dubo pri la karaktero de la neŭtraleco de Dana Esperanto-Asocio (DEA) kiel landa asocio aliĝinta al Universala Esperanto-Asocio (UEA), la ĝeneralkunveno de DEA per tiu ĉi deklaro emfazas, ke la agado de DEA nun kiel antaŭe estas firme bazita sur la principoj esprimitaj en la sube cititaj reguloj de la statutoj de DEA kaj UEA.

Statuto de DEA, 2.3 (traduko):

«DEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj, sed devas agadi por doni eblecon al ĉiuj konceptoj esprimigi en la lingvo.»

Statuto de UEA, par. 4:

«UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj.»

UEA deklaras ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo. Ĝia sinteno estas diktata de la ideaj celoj de la Esperanto-movado. Ĝi rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur ne-politika bazo klopodas efektiviĝi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio.»

Statuto de UEA, par. 13:

«Ĉiu Landa Asocio Esperantista povas aliĝi al UEA, se... vidiĝas klare el ĝia statuto, ke temas pri asocio neŭtrala laŭ la senco de par. 4.»

La ĝeneralkunveno insistas, ke tiuj principoj de DEA kaj UEA estu ĉiam kaj ĉie senescepte respektataj kaj restu nepre neŝanĝitaj.

Sekve, DEA devas protesti kontraŭ aliĝo al UEA de landa asocio, kies agado laŭ kontraŭneŭtralecaj principoj malkonformas al la supre cititaj reguloj.

Plie, DEA devas postuli, ke landa asocio, kiu post aliĝo al UEA ŝanĝas siajn gvidprincipojn tiel, ke ili fariĝas kontraŭaj al la supre cititaj reguloj, devas ekŝiĝi el UEA.

KOMENTOJ DE H. V. RASMUSSEN

Al la ĝenerala kunveno de Dana Esperanto-Asocio la 27-an de marto 1976 estis prezentita la aldonita propono pri "Deklaro pri neŭtraleco de DEA".

Dum la diskuto pri la propono nur du membroj, krom la proponinto, apogis ĝin. La ceteraj parolantoj aŭ rekte malaprobis la proponon aŭ rekomendis prokraston de la pritrakto ĝis post la Universala Kongreso en Ateno.

Ib Schleicher, prezidanto de DEA kaj komitatano A de UEA, atentigis, ke UEA rilate al orienteŭropaj landoj antaŭe devis interpreti elaste la regulojn pri neŭtraleco (vidu p. 24 en "Hamburgo en retrospektivo"), kaj informis, ke la estraro de UEA pro la aliĝpeto de la CLE en GDR kaj pro la ŝanĝo de la gvidprincipoj de Bulgara Esperanto-Asocio komencis esploradon de la statutoj de la landaj asocioj. La rezulto estos komunikita al la UK en Ateno, en kiu oni decidis pri la demando pri la praktikado de la principo de neŭtraleco kaj pri eventuala redifino de la principo. Tial, laŭ lia opinio, necesas atendi tiun decidon, antaŭ ol DEA prenos firman pozicion pri la neŭtraleca demando.

Gustav Küllman, komitatano C de UEA, opiniis, ke senkonsidere al paragrafoj 4 kaj 13 de la statuto de UEA oni devas — por esti plene neŭtrala — akcepti ĉiujn landajn asociojn, kiuj deziras aliĝi al UEA.

El la aliaj partoprenantoj de la diskuto menciindas *Eliza Kehlet*, kiu — apogante la vidpunkton, ke neblas akcepti en UEA landajn asociojn kun gvidprincipoj malkonformaj al tiuj de UEA — emfazis, ke en la aktuala situacio la persisto pri neŭtraleco povas ŝajni "unuokula", ĉar la kritiko kontraŭ neneŭtraleco havas nur unu direkton.

Je la fino de la diskuto prezidanto Schleicher prezentis jenan alternativan proponon:

«La ĝenerala kunveno konfirmas la neŭtralecon de DEA laŭ ĝia statuto.»

Tiu propono estis akceptita per 64 voĉoj kontraŭ 6 por la origina propono kaj 2 sindetenoj.

H. V. Rasmussen

Propono al la jarkunveno de DEJ en 1976, prezentita de Christian Lauridsen

REZOLUCIO AL TEJO

La jarkunveno de DEJ

konstatas, ke TEJO dum la lastaj jaroj ĉiel ignoris la punktojn 1 kaj 2 de artikolo 4 de ĝia propra statuto kaj neniel helpas kaj instigas la Landajn Sekciojn plenumi tiujn

celojn, konstatas, ke la nombron de komitatanoj de la unuopaj Landaj Sekcioj decidas arbitraj aŭ/kaj trompaj membronombroj.

Sekve ni

instigas al TEJO eklabori por Esperanto, kaj per propraj agadoj kaj per proponoj, instigoj kaj praktika helpo al la Landaj Sekcioj.

petas, ke TEJO kontrolu la membronombrojn de la Landaj Sekcioj kaj klopodu unuecigi ties membrokategoriojn,

kontraŭas akcepton de du Landaj Sekcioj en Ĉeĥoslovakujo, eĉ se tio estus ebla laŭ la nova statuto,

memorigas ĉiujn erojn de la asocio pri artikolo 5 de ĝia statuto, unua punkto, kiu validas ankaŭ por la komisionoj,

demandas, ĉu la kontraktoj kun MFDJ kaj IUS estas jam nuligitaj, kaj proponas en kazo de nea respondo tion fari, ĉar tiaj organizaĵoj laŭ nia opinio ne estas entenataj en la dua punkto de artikolo 5, same kiel partopreno en la t.n. "Mondaj Festivaloj",

demandas, ĉu en la statutoj de tiuj Landaj Sekcioj troviĝas paragrafoj similaj al tiuj de CLEK (GDR), kiu ja oficiale kontraŭas i.a. neŭtralismon,

proponas, ke TEJO agnosku la "Fundamentan principaron de informado pri la internacia lingvo" (Principaro de Frostavallen) kiel oficialan bazon por siaj estontaj agadoj rilate informadon pri Esperanto kaj la monda lingvo-problemo,

proponas, ke TEJO per sia nova statuto oficiale akceptu la nocion de la humaneca internaciismo, tia, kia ĝin difinis Ivo Lapenna per multnombraj artikoloj, paroladoj kaj prelegoj,

insistas, ke oni traktu ĉi tiun rezolucion dum komitatkunsido en Tesaloniki kadre de la 32-a IJK.

Ellaborita surbaze de la statuto, kiel ĝi tekstis post la ŝanĝoj en 1964, ĉar ni ne sukcesis akiri de la ĝenerala sekretario de TEJO respondon, ĉu iom ŝanĝiĝis tiu statuto, kaj kiuj estas tiuj ŝanĝoj.

KOMENTOJ DE CHRISTIAN LAURIDSEN

En la kunveno de DEJ oni malakceptis mian proponon, ne pro kontraŭargumentoj, sed ĉar oni ŝajnigis nescion pri la menciitaj problemoj kaj nekonon de la menciitaj dokumentoj kaj nocioj.

KORESPONDAJ SPERTOJ

La neobservita regulo.

Antaŭ kelkaj monatoj mi ricevis la duan instigon de la Centra Oficejo de UEA rilate al tiu asocio, kaj oni petis min klarigi kial mi ne sendis mian kotizon por la jaro 1975. Mi do sendis tripaĝan leteron enhavantan plurajn demandojn, proponojn kaj komentojn, kaj ricevis responde poŝtkarton de s-ro Sadler, kiu atentigis min pri lingva eraro, kiun mi estis farinta, kaj aldonis ke la estraraneco de s-ro Swistak estas tute laŭregula. Ĉar mi havas pri tio iom alian opinion, mi respondis per kelkaj koncizaj demandoj, interalie: «Ĉu s-ro Swistak estis tiam (1973) dum tri jaroj individua membro de UEA?». Kaj kion respondis s-ro Sadler? Ke «la koncerna regulo aperas en la art. 30 de la Ĝenerala Regularo de UEA», ke «laŭ la art. 27 de la Statuto de UEA "La Komitato decidas pri la Regularoj"», kaj ke «evidente la Komitato estas kompetenta fari esceptojn en siaj propraj regularoj, se ĝi tiel deziras». —Ĉu ne estus iom naive kredi, ke la ceteraj tavoloj de la asocio observas la statuton kaj regularojn, se eĉ ne la komitato mem faras tion? Ĉu la ĝusta agmaniero ne estus ŝanĝi la regulojn, tiel ke ankaŭ la komitato mem povus observi ilin? Aŭ oni povus ilin tute forigi; kial oni havu regulojn, kiujn neniu observas?

La malaperinta statuto.

Laŭ la sama konkludmaniero oni devas sin demandi, kial TEJO entute havas statuton. Skizante rezolucion al TEJO, pri kiu mi voĉdonigis la membrojn de Dana Esperanto-Junularo, mi bezonis la aktualan version de la statuto de TEJO, kiun mi sekve petis ĉe la ĝenerala sekretario de TEJO ekde 1974, kaj ĉe la komitatano de DEJ ekde nia aliĝo al TEJO en 1972. Unue alvenis respondo de nia komitatano. Ĝe Skovrind: «Via demando lokigis min en embarasan situacion, ĉar mi ordinare ne multe atentis pri la statuto de TEJO». Tio apenaŭ mirigis min, ĉar tiun neatenton li plurfoje pruvis age, sed la respondo de la ĝenerala sekretario de TEJO, Brunetto Casini, estis eĉ ŝoka: «Temas pri la nuna teksto de la Statuto de TEJO, kaj jen mi devas konfesi, ke mi ne konas ĝin: fakte, mi ne posedas ĝisdatan tekston de la TEJO-statuto; ŝajnas, ke ĝin posedas Flora Sabo-Felšo, ek kiam ŝi estis ĝenerala sekretario, sed ke poste ŝi iamaniere ne transdonis ĝin (forgeso) al la sekvanta sekretario (Rene 'Triol'), kiu sekve ne povis ĝin pludoni al mi. «Krome li informas, ke ĉi-pria letero, kiun li sendis al s-ino Szabó-Felšo antaŭ du monatoj "ricevis nenian respondon", kaj ke la teksto de 1964 (kiun dissendas la CO, kiam oni petas ekzempleron de la statuto de TEJO), estas ŝanĝita almenaŭ en § 2 de art. 18. Alivorte: dum pluraj jaroj nek la estraro nek la komitato scias kiel tekstas la statuto de TEJO. Komence de ĉi tiu alineo mi demandis, kial TEJO havas statuton; eble pli konvena demando estas: ĈU TEJO havas statuton?»

FR Germanujo

Inter la lastatempaj aktivecoj de Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) elstaras la jenaj:

- 1) Eldonado de du broŝuroj: represo de verketo de Karl MINOR (germana prilaboro de la Zamenhofa Proverbaro) kaj la studo de Prof. Mangold pri la facila lernebleco de Esperanto (kp. HORIZONTO 2/1976).
- 2) Arango de du kulturaj semajnfinoj je 7/9 Majo kaj 17/19 Oktobro kun trigradaj kursoj: komencantoj, progresintoj kaj praktikantoj. Kursojn C gvidas respektive Fernando de Diego (La Esperanta tradukarto) kaj Hartmut Trunte (Enkonduko en la lingvosciencan de Esperanto).
- 3) Dum novjaro 1976/77 okazos la 2a Internacia Esperanto-Seminario de SEL. Detalojn legu aliloke en tiu ĉi numero.
- 4) Kontakto kun partioj, parlamentaj gremioj kaj parlamentanoj de Sarlando rezultigis la pretecon de ĉiuj partioj okupiĝi pri la lingva problemoj kaj studi la rolon de Esperanto.

Pri la vivo de SEL regule raportas ties organo DIALOGO, kies abonon ni rekomendas al niaj legantoj. Jarabono: 10,— DM. Petu detalojn kaj prov-ekzempleron ĉe SEL, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

R. H.

Interkonsento pri kunlaboro

Post la eksigo de Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) el Germana Esperanto-Asocio (GEA) pro ties sistema ignorado de proponoj fare de SEL kaj pro ties partopreno en la hamburga puĉo de 1974 ne plu ekzistis rilatoj inter ambaŭ organizaĵoj. Dank al konversacioj inter la estraroj de SEL kaj la grupo Mannheim-Ludwigshafen ekestis la ideo pri interkonsento pri kunlaboro, ĉar kvankam GEA en siaj raportoj pri la agadoj en FRG (ne nur interne de GEA) sisteme prisilentas la aktivecon de SEL, ĝia agado kaj modela laboro ne estis kaŝeblaj. Jen kial la interkonsento estas ankaŭ forta morala bato por GEA. La teksto de la interkonsento estas jena:

La Esperanto-Amikoj Mannheim-Ludwigshafen (EAML) kaj Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL), sekvante la Konkludojn de la Pedagogia Seminario en Neustadt/Weinstraße (1975-12-27 ĝis 1976-01-03), interkonsentas pri jenaj formoj de kunlaboro:

- 1) Reciproka interŝanĝo de informoj;
- 2) partopreno en aranĝoj de ambaŭ organizaĵoj;
- 3) kunlaboro en aranĝoj de ambaŭ organizaĵoj per
 - a) interŝanĝo de prelegantoj,
 - b) starigo de la libroservo de SEL,
 - c) aliaj servoj.

Mannheim/Saarbrücken, 1976-03-31

Por EAML: Richard Reuchlin, prezidanto

Por SEL: Karl Burger, prezidanto

La aluditaj Konkludoj de la Pedagogia Seminario de Neustadt tekstas:

- 1) La antaŭenigo de Esperanto esence dependas de kiel eble plej alta lingvo-nivelo de la tuta Esperanto-parolanta komunado.
- 2) Konstanta utiligo de la lingvo kaj pliperfektigo en la lingvo estas la antaŭkondiĉo de plua progresado.
- 3) La ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj kaj tute speciale la agadgrupoj de la neŭtrala Esperanto-movado faru sian eblon por establi kursojn, en kiuj oni okupiĝu pri la perfektigo en la parola lingvo inkluzive la publikan parolarton, pri la enkonduko en la literaturon de Esperanto pere de sistema legado kaj literaturaj kursoj.
- 4) Pro la granda influo de la Esperanto-periodaĵoj je la lingvouzo kaj la konstatita fakto, ke multaj el ili grave neglektas la korektecon de la lingvo, la redaktoroj konsciiĝu pri sia respondeco kaj klopodu publikigi siajn periodaĵojn en maksimume modela lingvo.

Estus utile, se ankaŭ aliaj agad-grupoj farus tiajn interkonsentojn, ĉar tio popularigas nian laboron kaj konvinkos pri la ĝusteco de nia koncepto kaj sekve de nia vojo.

R. H.

ENIGMO-LUDO

PROTOKOLA EKSTRAKTO DE LA UEA-KOMITATAJ KUNSIDOJ

P-to 5 de la Tagordo: Deklaro de la prezidanto pri eksigo

La prezidanto atentigas, ke jam 30 jarojn li servis en la Estraro de UEA, kaj ke tial la momento estus konvena por ebligi al la Komitato elekti novan prezidanton, se ĝi tiel deziras.

S-ro A opinias, ke pli taŭgas la 50-jara datreveno ol la 30-a.

S-ro B konstatas, ke prof. Lapenna estas la plej elstara kaj unuiganta personeco en la Komitato, kaj ke tian figuron nepre bezonas monda organizo, en kiu la ofico de prezidanto estas tre delikata. Li same alvokas al la prezidanto repreni sian decidon en la intereso de la movado. La Ĉ-Asocio pritraktis en sia Komitato tiun ĉi aferon, kaj s-ro B nun parolas en ties nomo.

S-ro C subtenas la argumentojn de s-ro B. La movado ne havis en la moderna tempo prezidanton, kiu tiel bone reprezentis ĝin, kiel prof. Lapenna. UEA bezonas ne nur prezidanton, sed ankaŭ estraranojn reprezentajn kaj influhavajn. Li do petas en la nomo de E-Federacio la prezidanton ne forlasi la oficon en tiel grava periodo.

S-ro D certigas, ke la gvidantoj de F staras pretaj transpreni respondecojn en la gvidaj instancoj de UEA, tamen je la nepra kondiĉo, ke restos la ĝisnuna prezidanto.

Demandoj

- 1." Kiuj estas la elstaraj s-roj A, B, C, kaj D?
- 2." Kiuj estas la asocioj Ĉ, E, kaj F?
- 3." En kiuj cirkonstancoj estis esprimitaj tiaj deklaroj?

SOLVO DE LA ENIGMO - LUDO

1 — La elstaraj s-roj A, B, C, kaj D estas respektive:

- s-ro Bela Berceli, komitatano A de la HUNGARA ASOCIO —
- s-ro N. B. Aleksiev, komitatano A de la BULGARA ASOCIO —
- s-ro Einar Dahl, komitatano C de Svedio —
- s-ro Ulrich Lins, membro de la Komitato de TEJO —

2 — La asocioj Ĉ, E kaj F estas respektive:

- la BULGARA ESPERANTO-ASOCIO —
- la SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO —
- la TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO (T. E. J. O.) —

3 — Estas vero, ke la tiamaj cirkonstancoj estis aliaj.

La kunsido de la Komitato okazis la 3-an de aŭgusto 1968, tio estas do: — unu jaro antaŭ la fama DEKLARACIO DE TYRESÖ, per kies interpretaj komentoj la junulara organizo pli kaj pli devojiĝis sur unupartipolitikan kampon (*); sekve antaŭ ol la komunistaj asocioj ekorganizis siajn "specialajn" renkontiĝojn (**) cele al rekta politikigo de la movado per revivigo de "Proleta Internaciismo"; — kaj kvin jaroj antaŭ ol UEA en Hamburgo defalis de sia politika neŭtraleco.

Fine la tiama "deklaro de la prezidanto" montras, ke male al la malicaj asertoj kaj subdiroj, kiujn kelkaj disfamigas tra la Esperanto-Movado, prof. d-ro Ivo Lapenna jam estis preta transdoni la prezidantecon sed al homo, kiu ne estus la "ostaĝo" de partipolitikaj promesoj kaj postuloj.

Jean Thierry

(*) Ĉar la svedo Tomas JANSSON nun ne hezitas deklari sin «aktiva membro de la Komunista Partio jam de 1969», tiel evidentiĝas eĉ, ke en la manovra periodo 1973/74 kaj la prezidantino kaj ambaŭ vicprezidantoj de TEJO estis membroj de la Komunista Partio.

(**) Kiel ekzemple estas «La VII-a Konsultiĝo de la esperanto-organizaĵoj de eŭropaj socialismaj landoj», kiu okazis en Melnik, ĈSSR, de la 28.marto ĝis la 2.aprilo 1975.

17.^a EUROPA FERIO-SEMAJNO EN SVISLANDO

Okazonta de la 12.^a ĝis la 18.^a de septembro 1976

en Magliaso, ĉe la lago de Lugano

Informoj ĉe la organiza adreso, S-ro Ernst Glättli, SAEF-sekretario, Laurstrasse 17, CH-5200 BRUGG (Svislando).

REVUO DE LA REVUOJ

HEROLDO DE ESPERANTO, fidela al sia tradicio informi honeste kaj objekte anoncas en sia numero 6 (5 aprilo 1976) pri la apero de HORIZONTO:

«Pamfleto. Kvar aŭ kvin (ĉiam la samaj) malamikoj de UEA, malgajnintoj kaj izolitaj eĉ en sia propra landa Movado, kreis la pamfletan revuon HORIZONTO, en kiu ili ripetas ĉiam la samajn malverojn kaj atakojn de la antikva, fakte ne-reelektita, prezidanto de UEA.»

Dankon, HEROLDO, pro alia brila monstro de jurnalisma etiko.

—oOOo—

En la sama numero de HEROLDO DE ESPERANTO, d-ro Janton finas per la jenaj vortoj sian recenzon pri la libro de Haupenthal, *Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik*:

«Eble estas la rolo de la esperantistaj interlingvistoj iel redoni al ĝi [Esperanto] la evoluon kaj perfektigan forton haltigitan en 1905 pro la dogmo pri netuŝebleco.»

Se la 'esperantistaj interlingvistikoj' vidas tiom da mankoj en Esperanto, nenio retenas ilin doni al la mondo la eltrovojn de ilia genia cerbo. Eble, same kiel Esperanto donis la finofaran baton al Volapük, tiel niaj eminentaj lingvistoj facile kreos la definitivan lingvon internacian. Ĉiu la sian, kompreneble... Kiel faris doktoroj Edgar von Wahl, Alexander Gode, Otto Jespersen, Joseph Peano... D-ro Janton aliĝu senceremonie al la honora listo.

—oOOo—

ESPERANTO, februaro 1976, daŭrigas sian sinkontraŭdiron. Sur paĝo 23 troviĝas la kutimaj bombastaj kaj flataĉaj vortoj pri la homoj kaj agoj de la nuna estraro. Jen la kortuŝa priskribo farita de s-ro Milojeviĉ:

«Ankaŭ en la kunsidoj de la estraro de UEA, kiel cetere en la tuta Movado, observanto spertas tiun en la moderna mondo ĉiam malofte renkontatan fenomenon, ke la homoj tiel serioze dronas en la aktualan demandaron de la Asocio, kvazaŭ ili havus en la tuto ian grandegan personan intereson, kvazaŭ ilia okupiĝo pri ĉi tiuj problemoj estus alte salajrata, kvazaŭ ĝi, almenaŭ oficiale, ne estus nur ilia kromokupo. Sekvante la debatojn en la estrarkunsidoj, oni neniel povus veni al la ideo, ke Tonkin profesie okupiĝas pri literaturo, ke Stop-Bowitz profesoras pri zoologio, ke Bormann estras ministerian fakon, ke Wensing estas komerca konsilisto, Denoël kuracisto, Szabó-Felsö advokato, [je Dio, s-ro Milojeviĉ, se vi flatas, iru la tutan vojon ĝis la fundo de la flatujo. Ŝi tute ne estas malbela kaj vireca, ke oni nomu ŝin advokato anst. advokatino!] Swistak juristo, Woessink imposta specialisto; en la estrarkunsidoj oni facile konvinkigas, ke ĉiuj ĉi homoj estas ĝisoste profesiaj esperantistoj.» Je Dio, tia plejado!

Iom poste, s-ro Milojeviĉ triumfe distrumpetas:

«La financa situacio montriĝis klara kaj konsiderinde pli hela ol dum pluraj lastaj jaroj... Ĉio ĉi kompreneble ne signifas, ke la Asocio ne plu havas financajn problemojn: oni nur sukcesis bridi ilin, oni ekrajdis la drakon.

Sed kontraŭdire kaj kvazaŭ malklimakse, sur paĝo 32, artikolo Milo por Pollando, oni sobre konfesas: «...en la nuna delikata financa situacio de UEA...» Kaj la leganto de la revuo, certe iom perpleksas, ĉu efektive oni ekrajdis la drakon, aŭ ĉu la delikata financa situacio ne impresas pli grave kaj serioze ol la esprimo *bridado de la financaj problemoj*.

Nu, la suspektoj kreskas, kiam en la sama artikolo legiĝas, ke «la Centra Oficejo konstatis, ke la individua membraro de UEA en Belgio dum la sama jaro [1975] malkreskis nur je 14 membroj». Kio okazas do? La 'bremso' Lapenna ne plu "bremsas"; nun gvidas UEA-n renoviga, demokratia, freŝinspira, dinamika, juna estraro, kiu promesis forsvingi la Asocion el ĝiaj "stagno kaj apatio", kaj jen... la estraranoj gratulas unu alian ĉar en Belgio la individuaj UEA-anoj malkreskis nur je 14 membroj. Sed fakte, tiel brila estraro eĉ ne kapablas ĝis nun la simplan taskon aperigi ĝustatempe la organon de UEA, 'forĝegas' informi kiom da membroj apartenas ankoraŭ al la Asocio, kaj eĉ 'forĝegas' menciigi la ĝisnunan nombron da partoprenantoj en la UK de Ateno.

—oOOo—

Gratulojn al la nova skipo de BOLETIN, organo de Hispana Esperanto-Federacio. La bulteno, en sia nova, agrabla vesto, montras la originalan trajton, ke ĝi aperis ne datita kaj ne numerita. Sed plej grava estas la saluto de la nova redakcio, subskribita de s-ro Aragay, ĉar interalie li diras:

«Iom post iom ni esperas atingi propran reliefon. Kiamaniere? Impulsante nian Federacion al pli energia aktivado en ĉiuj branĉoj...»

Tiel simple: impulsante. Kiel? Ni volus scii. Kaj sendube ankaŭ la "ĝisoste profesiaj esperantistoj" en la komandejo de UEA. S-ro Aragay ne ŝparu la aplikon de sia mirakla recepto.

En INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO (januaro-februaro-marto 1976), d-ro Bormann daŭrigas siajn cerbumadojn pri *Neŭtraleco laŭ teorio kaj praktiko kaj finas sian artikolon per ĉi tiu bela galimatio:*

«*Sed ĝenerale, esperantistaj organizaĵoj, kiuj politike ne estas fiksitaj kaj estas neŭtralaj laŭ statuto, devas preferi ne esprimi iun opinion. Tio estas rigora neŭtraleco, kiun ni komprenas kiel aktivan neŭtralismon kaj taksas sola konvena. Tamen estas pripensende, ĉu tiu principo, kiu por la tutmonda ĝenerala organizaĵo de la esperantistoj devas nepre validi, estas atendenda ankaŭ flanke de landaj organizaĵoj. Ekz. landaj asocioj en komunismaj landoj estas originz komunismaj organizaĵoj politike kontrolataj aŭ kontroleblaj. Ili ne povas agadi sen samtempe pledi en la kadro de la celoj de sia ŝtato. Ili ne povas ŝanĝi ion en tiu rilato. Des pli necesas, ke la tutmonda organizaĵo, nepre obeas la postulon de absoluta neŭtraleco. Nur tiamaniere ĝi povos resti laborkapabla. Certe ankaŭ ĉiuj landaj asocioj devus havi la saman sintenon en agadoj, en kiuj ili kunlaboras kun la centra organizaĵo.*»

Mi humile konfesas, ke mi ne kapablas sekvi la zigzagojn kaj piruetojn de la dialektiko de d-ro Bormann. Ĉio ĉi ŝajnas al mi mensa kaĉo de kolosaj proporcioj, kaj fakte mi ne scias, ĉu li montras «dangerajn inklinojn al esperantista 'sektismo'» (oni vidu la elokventan programon de la Ĉefia Esperanto-Asocio por la jaroj 1976-1980) aŭ aprobon de la proleta internaciismo. Eble eĉ li mem ne scias. Ĉe Bormann, lia sola klara kaj konstanta ideo, estas lia monomanio ataki la personon de Lapenna.

Kaj ĝis la proksima revu-rikolto, kun miaj plej koraj salutoj

F. de Diego

MALLONGE

Komencas apcri en la hispana gazetaro informoj pri la traduko de la fama literatura majstroverko Don Quijote de la Mancha en Esperanto. Unue sciigis pri tiu versio la ĵurnalo de Zaragoza "Heraldo de Aragón" en oktobro de la pasinta jaro. Kaj laste, okaze de la datreveno de la morto de Cervantes, sur tuta paĝo informis la grava periodaĵo de Salamanca "La Gaceta Regional" en sia dimanĉa suplemento "Gaceta Dominical".

En la Esperanta elsendo de 26.03.76 Radio Zagreb tre favore recenzis la unuan numeron de *Horizonto*. Ĝi laŭdis la aspekton kaj enhavon de la revuo, menciis laŭnome ĉiujn kunlaborintojn kaj aparte atentigis pri la plej gravaj artikoloj. Kun kontento estis notite, ke la valora rubriko "Revuo de la revuoj", redaktata de Fernando de Diego, ne malaperis, sed transiris al *Horizonto*. Dankon al la Redakcio de Radio Zagreb pro la objektiva prezento de nia periodaĵo.

Ankaŭ Radio Viena afable informis pri la apero de *Horizonto* kaj recenzis la du unuajn numerojn kun speciala mencio pri la ĉefaj artikoloj. Dankon al la Redakcio de Radio Viena pro la fava atentigo, kiun donas al nia periodaĵo.

Esperanto en Radio Vatikana

(0,30 hec - 1529 khz mezlonga ondo)

Ekde la 18^a de aprilo, ĉiudimanĉe surondigas mallonga programo en Esperanto, en la kadro de la dissendo "Kun vi dum la nokto".

Temas pri malgranda paŝo, kiu tamen montras la estimon de la Vatikana Radio por la Esperanta idealo, kaj deziras kontentigi la multajn alvenintajn petojn.

El bulteno de Radio Vatikana

Je marĝeno

Kiu el ni ne legis en junaĝo la mirindajn aventurojn de la nobla kavaliro Don Kiĥot, hispane Don Quijote, ne ridis pro ili kaj kun kortuŝo ne sekvis lian migradon sur Rosinanta, akompanate de la fide-la Sanĉo-Pansa. La genia verko de Cervantes eniris en trezorejon de la tutmonda kulturo kaj ĝia apero en la internacia lingvo estus nepre salutinda.

La unua ĉapitro de tiu ĉi mondfama verko aperis en Esperanto en "Horizonto" en bonega traduko de Fernando de Diego. Estas dezirinde, ke la tutaĵo baldaŭ aperu kaj estu vera ornamaĵo de ĉiu Esperanta biblioteko. Tamen ne estas rozoj sen dornoj. En la menciita ĉapitro bedaŭrinde troviĝas nenecesaj neologismoj: grivo, dokta, feroĉa, insolenta k.a.

Mi ĝojos, kaj verŝajne ne nur mi, se la tradukinto antaŭ ol finpresio forigos la neologismojn kaj prezentos la verkon en la Zamenhofa lingvo.

Mag. I. Dratwer. Israelo

Sendube Mag. I. Dratwer neatente legis en la enkonduko al la Ĉapitro I de Don Quijote de la Mancha en Esperanto, la trian alineon, kiu tekstas jene: «La Esperanta Don Quijote de la Mancha de Fernando de Diego montras la tipajn karakterizojn de liaj tradukaj principoj: ekspluato de la naturalismaj kaj analizaj tendencoj de Esperanto...».

Krome, Esperanto —vivanta lingvo— evoluas kaj devas evolui laŭ la bezonoj kaj la tempoj.

I. G.

ESPERANTO EN RADIO

Generalaj informoj pri diversaj disaŭdigoj en Esperanto. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horszistemo de Greenwich.

Pola Radio — Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90 m (6135 kHz), 41.27 m (7270 kHz).

15.30-16.00 Varsovio, 41.99 m (7145 kHz), 31.45 m (9540 kHz), 31.01 m (9675 kHz).

21.30-22.00 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90 m (6135 kHz).

Pola Radio, Esperanto-Redakcio Poŝtkesto 46, P1-00950 Warszawa, Pollando.

Radio Roma — Dimanĉe

20.00-20.20 Romo, 49.92 m (6010 kHz), 41.24 m (7275 kHz), 41.15 m (7290 kHz).

Radio Roma. Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italujo.

Svisa Kurtonda Radio — La Svisa Kurtonda Radio plioftigis siajn kronikojn en Esperanto ripetante ilin ekde la 5a de majo dufoje. Ili do estas nun aŭdeblaj sesfoje en la semajno. La elsendoj okazas laŭ jena skemo:

S-ro Arthur Baur prelegas lunde je 13.20 kun ripetoj marde kaj ĵaŭde je 23.35.

S-ro Claude Gacond prelegas merkrede je 13.20 kun ripetoj vendrede je 13.20 kaj sabate je 23.35 (Mezeŭropa tempo).

La ondolongoj estas por ĉiuj elsendoj 75, 49 kaj 31 metroj, krome la tagmezaj elsendoj estas ankaŭ aŭdeblaj sur la ondoj 19, 16 kaj 13 metroj kaj la vesperaj sur 25 kaj 19 metroj.

Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15.

Radio Vieno — Sabate, Dimanĉe

16.45-16.55, sabate, Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 16.87 m (17780 kHz).

05.45-05.55, dimanĉe, Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 41.64 m (7205 kHz), 16.85 m (17800 kHz).

Esperanto-Redakcio de ORF, P.O. Box 700, A-1041 Wien, Austria.

Radio Zagreb — Vendrede

23.05-23.20, Zagrebo, 264 m (1163 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavia.

Radio Sabadell — Merkrede

20.45-21.00, Sabadell, 203 m (1475 kHz), 89.1 MHz (mod. frekv.). Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanujo.

Radio La Voz de Levante — Sabate

22.00-22.15, Valencio, 358 m (836 kHz), La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

Radio Clube de Sorocaba — Lunde

00.00-01.00, Sorocaba, 278 m (1080 kHz). Radio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, Brazilo.

Radio Pekino — Dimanĉe, Vendrede, Sabate

11.00-11.30, dimanĉe, Pekino, 47 m, 40 m, 30 m.

12.30-13.00, Pekino, 30 m, 25 m, 19 m.

20.00-20.30, vendrede, Pekino, 43 m, 33 m, 31 m, 25 m.

11.00-11.30, sabate, Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00, Pekino, kiel dimanĉe.

20.00-20.30, Pekino, kiel vendrede. Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Pop. Resp. Ĉinio.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2									
3									
4									
5									
6									
7									
8									
9									

HORIZONTALA - 1 - Urb' simbole fama pro antikva totalismo - 2 - Endoktrinigi iompostioma-maniere - 3 - Dancmuzika kanto - 4 - Indikas ŝanĝon de loko aŭ stato - Rapida marŝ' - 5 - Ĉi tiu ide' karakterizas la mankon de flekseblo - 6 - Kun rezultatingo - Inklin' al io - Enkondukas kvanton - 7 - Rabobird' - Nestabila atmosfer' - 8 - Meze de mesoservantoj - 9 - La plej rara kvalit'.

VERTIKALE - 1 - Fariĝis urĝa bezon' post la 2-a horizontale - 2 - Kalkuli per diferencialoj kaj integraloj - 3 - Mezurunu' - Malfermegos okulojn kaj buŝon - 4 - Eksenti inklinon - Fonetike: spacoparto - 5 - Monunu' - Trema ebri' - 6 - Krem' - Ileks' - 7 - Nov-Zelanda loĝant' - Subita malfeliĉ' - 8 - Poem' - Precipe pervoĉe - 9 - Iama stat' de UEA.



2.^a INTERNACIA ESPERANTO-SEMINARIO (IES) DE SEL

Sarlanda Esperanto-Ligo invitas al sia 2a Internacia Esperanto-Seminario. Jen la detaloj:

Temoj: 1) Rasismo - antirasismo.
2) Enkonduko en la esperantologion.

Tempo: 28-12-1976 ĝis 05-01-1977.

Loko: Hedwig-Dransfeld-Haus, Im Wenigerbachtal, D-5413 Bendorf (Rhein), Tel. (02622) 3006/3007.

La konferencejo situas ĉe la rando de Westerwald sur la Rejna Ebenajo ekster la urbo Bendorf, proksime de Koblenz. (En Bendorf estas trajnstacio kaj aŭtoŝosea aliro.)

Programo: Okazos prelegoj kaj grupa laboro sub gvido de: *Prof. D-ro Ivo Lapenna* (temo 1).

Pri temo 2) prelegos: *Eddy Borsboom*, Utrecht (aspekto socia-historia); *Reinhard Haupenthal*, Saarbrücken (aspekto lingvistika); *Jean Thierry*, Paris (aspekto literatura).

Krome okazos lingvaj ekzercoj por progresintoj, diskutadoj kaj ekskursoj kaj silvestra balo.

Loĝado: Ĉiuj konferencanoj loĝos en la domo mem en unu kaj dultaj ĉambroj. La domo estas moderne ekipita kun biblioteko, teknikaj aparatoj, sporteblecoj, naĝejo kaj saŭno.

Kotizo: La aliĝkotizo estas 20,— DM.

Prezoj: La taga tarifo, kiu inkluzivas kvar manĝojn, tranoktadon kaj utiligon de la instalaĵoj estas 33,— DM.

Aliĝo: Aliĝilon oni sendu al:

Sarlanda Esperanto-Ligo, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

Aliĝintoj ricevos detalan seminarian programon.